IPR
INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO


Driemaandelijks tijdschrift
Afgiftekantoor: Antwerpen X. ISSN 1013-2031

Jarkolekto 37 - trimonata
07/1

Redakta komitato:
Jozefo Németh (red.)
Luiza Oberrauch Madella
Rob Moerbeek
Iwona Kocieba

Kunlaborantoj de la aktuala numero:
Detlev Blanke
Valeria Bocchini
Renato Corsetti
Probal Dasgupto
Leo De Cooman
Gediminas Degesys
Boris Kolker
Zsofia Korody
Katalin Kovats
Geza Kurucz
Mauro La Torre
Vittorio Madella
Maria Majerczak
Aleksandro S. Melnikov
Atilio Orellana Rojas
Graziano Ricagno
Spomenka Stimec
Ermanno Tarracchini
Nguyen Thu
Julianna Vas-Szegedi
Josef Vojacek

ilei
Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj



ENHAVO

Komenco bona, ĉio bona (Renato CORSETTI) 3
Katalin KOVÁTS: *Eŭropa Lingva Dokumentujo por ni esperantistoj* 4
Leo DE COOMAN: *Kiom valoranalizo valoras en pedagogio?* 6
Graziano RICAGNO: *Eksperimenta serĉo pri lingvaj malfacilaĵoj* 13
Probal DAŜGUPTO: *Esperanto liveras ilaron por leksikokerna esploro* 17
Intervjuo kun Detlev Blanke (intervjuis: Katalin KOVÁTS) 18
Géza KURUCZ: *Esperanto en mia vivo* 22
Biografietoj de la SK – IV. (B. KOLKER, A.S. MELNIKOV, M. LA TORRE) 24
La 40-a Konferenco de ILEI en Ranzan, Japanio (ripeto de informoj) 27
El la landoj kaj sekcioj... [CZ, DE, HU, HR, LT, NL, PL, US, VN] 28
Lernejaj E-koncertoj – projekto de ICK (Maria MAJERCZAK) 31
AKEL2 en Gloucester (TARRACCHINI, BOCCHINI, OBERRAUCH, MADELLA *k.a.*) 34

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Radojica Petrović, *Bul. oslobodjenja 36/14, 32000 Čačak, Serbio. Tel. (+381) 32371053. Fakso: (+381 32) 342101, <radp@ptt.yu>* Kunordigado, eksteraj rilatoj, la projekto InterKulturo.

Sekretario: Atilio Orellana Rojas, *Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando. Tel. (+31 70) 3556677, fakso: (+31 70) 358 4422, <atilioorellanarojas@gmail.com>*

Vicsekretario: Aida Čižikaitė, *Zamenhofo g. 5, LT-44287 Kaunas, Litovio. Tel. (+370) 37 208503. <aidute@mail.lt>* Konferencoj. Scienca agado.

Estrarano pri financoj: Sjoerd Bosga, *Tråddragargatan 27D, SE-723 37 Västerås, Svedio. Tel. (+46 21) 41 70 45, <sjoerd@esperanto.se>*

Estrarano: Yas Kawamura, *13-8 Nakayata-cho Babanomizo Kameoka-si, Kyoto-fu, JP-621-0855, Japanio, <yas@esperanto.at>* Azia agado.

Estrarano: Zsófia Kóródy, *Esperanto-Centro, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg/Harz, Germanio. Tel./fakso (+49) 5521-5983. <zsofia.korody@esperanto.de>* E-centroj, instrukapabligado, ekzamenoj.

Estrarano: Mihai Trifoi, *Str. Principala Bl.1 Ap.3, RO-527116 Bixad/Jud. Covasna, Rumanio (+40) 267-365319, <trifoi@honoris.ro>* Lerneja agado.

Titolpaĝe: Paroliga ekzerco sub gvido de Radojica Petrović en Roskilde (Danio) dum la progresiga kurso de la dana ILEI-sekcio. Vidu IPR 06/4, p. 22.

Scienca Komitato

***Prezidanto*: Humphrey Tonkin**, Usono, University of Hartford; AdE[1]

***Vicprezidanto*: Detlev Blanke**, Germanio, Prezidanto de la Societo pri Interlingvistiko

***Membroj*:**

Vera Barandovská-Frank, Germanio, Universität Paderborn, AIS[2] San Marino

Duncan Charters, Usono, Principia College, Elsah

Renato Corsetti, Italio, Università degli Studi di Roma "La Sapienza"; AdE[1]

Probal Dasgupta, Barato, University of Hyderabad; AdE[1]

Michel Duc Goninaz, Francio, Université de Provence; AdE[1]

Aloyzas Gudavičius, Litovio, Šiaulių universitetas

Wim Jansen, Nederlando, Universiteit van Amsterdam

Boris Kolker, Usono, AdE[1]

Ilona Koutny, Pollando/Hungario, Uniwersytet im. Adama Mickiewicza w Poznaniu; AdE[1]

Mauro La Torre, Italio, Università degli Studi Roma Tre

Maria Majerczak, Pollando, Uniwersytet Jagielloński w Krakowie

Geraldo Mattos, Brazilo, Federacia Universitato de Paranao; AdE[1]

Aleksandr Melnikov, Rusio, Академия Сельскохозяйственного Машиностроения

Radojica Petrović, Serbio, Univerzitet u Kragujevcu

Balázs Wacha, Hungario, Magyar Tudományos Akadémia, Nyelvtudományi Intézet

Sekretario: **Aida Čižikaitė**, Litovio, estrarano de ILEI

[1] AdE – Akademio de Esperanto

[2] AIS – Akademio de la Sciencoj, San Marino

Komenco bona, ĉio bona



Komenco bona, ĉio bona: tio certe validas por la jaro 2007-a. Ĉi tiu estas la unua numero de ĉi tiu revuo por la jaro 2007-a kaj mi havas la plezuron enkonduki vin al unu el la gravaj temoj de ĝi. Temas pri la *Eŭropa Referenckadro* pri lernado kaj instruado de lingvoj.

Neeviteble, finfine la Esperanto-movado kaj la *Konsilantaro de Eŭropo* renkontiĝis pri lingvo-lernado.

Tio okazis lastatempe rilate al la gvidlinioj por taksi la instruadon kaj la lernadon de Esperanto, pri kiuj vi legos pli detale en alia artikolo.

La broŝuro, kiun UEA eldonis, kadre de la laboroj de la komuna laborgrupo de IEK/ILEI/UEA/AdE, prezentas al la parolantoj kaj al la instruantoj de Esperanto la bazajn tabelojn de la *Eŭropa Referenckadro*, kaj esence sugestas al ili apliki tiujn gvidlinioj ankaŭ je la instruado de Esperanto.

Do, bonan legadon de ĉi tiu numero de IPR kaj bonan legadon de la libreto pri la *Eŭropa Referenckadro* kaj bonan aplikadon de ties principoj.

Renato Corsetti
Prezidanto de UEA

Eŭropa Lingva Dokumentujo por ni esperantistoj

de Katalin Kováts,
doktoro pri lingvistiko, metodologo, redaktoro de <www.edukado.net>

En januaro 2007 UEA, kunlabore kun ILEI, eldonis informobroŝuron kun la titolo ***La Komuna Eŭropa Referenckadro** – Pri instruaj kaj taksaj metodoj por la akiro de modernaj lingvoj*[1].
La kernon de la 24-paĝa materialo konsistigas la esperantlingva traduko de la unua ĉapitro de la plurcentpaĝa libro[2] eldonita de la Konsilio de Eŭropo (Strasburgo) kaj konsiderata la plej baza kaj grava dokumento en la eŭropa lingvoinstrua medio. En la kajero estas republikigataj ankaŭ la memtaksaj tabeloj de la *Referenckadro* kaj aldona artikolo pri la uzo de la *Europass*-sistemo.
Per la eldonaĵo UEA kaj ILEI celas diskonigi la enhavon kaj la signifon de la *Referenckadro*, informi pri sia kunlaboro kun la Lingva Departemento de la Konsilio de Eŭropo kaj indiki la paŝojn faratajn kaj farotajn kun la celo ebligi al la tutmonda esperantistaro pli kvalitan kaj pli modernajn lingvolernajn kondiĉojn kaj egalajn lingvajn rajtojn.
La broŝuro estas rete elŝutebla ĉe <www.edukado.net> kaj la paperforma estas akirebla ĉe UEA.
La sube legebla teksto estas parto de la broŝuro.

La E-movado devas flekse reagi al normoj, tendencoj kaj novaj prilingvaj decidoj de la eŭropaj politikaj kaj edukaj instancoj, des pli se tiuj estas serioze konsideataj kaj ekaplikataj ankaŭ ekster Eŭropo, kiel tio okazas jam al la *Referenckadro* en pluraj ŝtatoj en Usono kaj en kelkaj landoj ankaŭ en Azio.
Lingvopolitikaj simpozioj kaj lingvistikaj konferencoj, internaciaj agadkampanjoj, perlingvaj kaj prilingvaj fakaj kaj sciencaj agadoj altigas la prestiĝon de E-o. Jam de pluraj jaroj diversaj projektoj kaj iniciatoj klopodas penetrigi E-on kiel pontolingvon en Eŭropan Union. Kvankam ni

[1] KOVÁTS, K. (red): *La Komuna Eŭropa Referenckadro – Pri instruaj kaj taksaj metodoj por la akiro de modernaj lingvo.* UEA, Rotterdam, 2007. (24p.) – *ISBN 978 929017095*

[2] The Common European Framework in its political and educational context in: *Common European Framework of Reference for Languages: Learning, Teaching, Assessment*. (CEFR) Strasbourg: Council of Europe, 2001.

ne atingis ke ĝi estu oficiala lingvo aŭ neŭtrala pontolingvo en eŭropaj ŝtatoj, estas tamen kelkaj pozitivaj rezultoj de nia informlaboro. Nur kelkaj lastatempaj ekzemploj: en politikaj kunsidoj en Bruselo kaj Bratislavo okazis oficiala interpretado helpe de E-o, aperis en la paĝaro *Tago de la Lingvo* (prizorgata de la Lingvopolitika Departemento de la Konsilio de Eŭropo kaj de la Eŭropa Centro de Modernaj Lingvoj) esperantlingva traduko de oficialaj dokumentoj, en la elektronike kreebla oficiala lingva pasporto kaj dokumentujo (vidu ĉe *Europass*) E-o estas laŭprograme listigita kiel priskribebla kaj dokumentebla lingvo. En la nuna kazo de la *Referenckadro* kaj Lingva Dokumentujo la esperantlingvaj eldonaĵoj kaj akiro de ties tradukpermeso signifas rekonon de E-o ĉe la Konsilio de Eŭropo. Traduko de la *Referenckadro* (plurcentpaĝa faklibro) kaj tiumaniera disponigo de terminologie kaj strategie baza materialo por lingvolernantoj, instruantoj kaj kursoplanistoj ne nur plifaciligas la laboron de la instruistoj kaj lernantoj de la lingvo, sed ankaŭ pruvas, ke E-o same estas "moderna lingvo" kaj ke nia movado kapablas je profesia laboro.
Ĉiukaze ni devas konfesi ke ni esperantistoj estas tamen ne tro fruaj pri tiuj procedoj. Multaj landaj edukinstancoj de Eŭropo jam de 5-6 jaroj serioze laboras tiukampe, formis siajn laborgrupojn kaj trejnis fakulojn, ellaboris la ekzamensistemojn, prezentis ilin por akreditado, laborante en internaciaj teamoj dividas siajn spertojn, disponigas analizojn kaj rezultojn.
Por la teamo de esperantistoj montriĝas irebla vojo utiligi la jamajn spertojn, helpe de fakuloj (laborintaj jam en naciaj teamoj) adapti materialojn kaj sistemojn al la cirkonstancoj kaj bezonoj de la internacia lingvo kaj ties komunumo. Rezulte de tio espereble ni ne devos longe atendi je la ekfunkcio de nova UEA/ILEI-ekzamensistemo, konforma al la eŭropaj normoj. Informi esperantistojn rekte en E-o pri la normigaj tendencoj kaj iniciatoj de la eŭropaj instancoj ebligas diskonigi la sistemon larĝskale kaj prepari la vojon al vere internaciaj uzo kaj rekono.

La taskoj por esperantistoj en la nuna fazo estas:

- trastudi la antaŭ nelonge eldonitan broŝuron, orientiĝi pri la lingvonivelaj skaloj de la ĝenerala tabelo (A1-C2) kaj apliki ilin por difino de lingvoniveloj kaj por klasifiko de lanĉotaj kaj frekventotaj kursoj, studoj, planataj instruprogramoj kaj enlandaj ekzamensistemoj;
- trovi kaj ekuzi la nacilingvajn broŝurojn de Lingva Dokumentujo (*Portfolio*) kaj listigi tie inter la regataj, studataj lingvoj ankaŭ E-on. La uzo de tiuj dokumentoj fariĝas pli kaj pli populara kaj necesa inter la

junuloj kaj studentoj (sekve speciale instruistoj kaj gepatroj de ‘denaskuloj’ povas multe helpi tiukampe). La Lingva Pasporto estos taksata pli serioze ankaŭ de eŭropaj labordonantoj kaj instruinstancoj. La raportoj pri E-o, spertoj pri ĝia interkultura uzo, la eventuale bonaj kaj relative rapide akiritaj rezultoj en la alproprigo de tiu lingvo espereble altiros la atenton de fakuloj pri lingvoinstruado kaj -taksado.


Rilate al la *Referenckadro* la ĉefa tasko de niaj fakuloj pri lingvoinstruado estas:

- oficiala kaj konsekvenca apliko de la nova skalo kaj de la koncernaj terminoj;
- ellaboro kaj akreditigo de nova, laŭnorma ekzamensistemo de UEA/ILEI.

Pri la efektiviĝo de tiuj taskoj serĉu la informojn en la oficialaj organoj de ILEI kaj sur la porinstruista hejmpaĝo <www.edukado.net>, kiu disponigas la tradukitajn dokumentojn, ligojn al la koncernaj nacilingvaj paĝaroj kaj planas lanĉi interagan ekzamenejon, kiu helpas rete taksi onian lingvo-nivelon laŭ la normoj de la *Referenckadro*.

Kiom valoranalizo valoras en pedagogio?[3]

de Inĝ. Leo De Cooman



Permesu al mi provi iom ekspliki la metodon nomitan *valoranalizo* (nederlande: *Waarde-analyse*, france *analyse de la valeur*, angle: *value analysis*, germane: *Wertanalyse*, ruse *стоимостный анализ*), ankaŭ priskribita en naciaj (ekzemple DIN 69910, VDI 2803) kaj internaciaj normoj (EN 12973). Ĝi estas potenca metodo ofte uzata en organizaĵoj por solvi problemojn en la kampoj de projektado, kvalito, sekuro, kostredukto, organizado, kaj similaj. La metodo estis disvolvata post la dua mondmilito en granda usona firmao, kiam mankis strategiaj materialoj. Kunlaboranto estis komisiita trovi anstataŭajn materialojn kun egala aŭ pli bona efiko por malpli alta prezo. Li

[3] La artikolon recenzis la *Scienca Komitato* de IPR.

redaktis rigorajn laborskemojn por atingi tiun celon. La rezulto estis ŝparo de 40%. (*Laurence D. Miles*, firmao *General Electric*)

La koncepto “valoro” estas difinebla kiel grado de plenumo de funkcio. La koncepto funkcio (aŭ bezono) estu komprenata en plej larĝa senco. En maŝino aŭ aparato ĉiu parto havas difinitan funkcion utilan al la tasko, kiun la maŝino aŭ aparato plenumu. Tia tasko povas esti: fari produkton, ekzemple najlon, elektron, kukojn, seĝon, foton, sonon kaj similajn, aŭ plenumi agon, ekzemple purigi, varmigi, protekti, aerumi, transporti. Same en organizaĵo ĉiu ago, dokumento, programo, ... havas funkcion, servas al difinita (aŭ difinenda) celo. Estas pripensinde, ke ĉiu produkto havas klienton aŭ uzanton. Kiu aŭ kio estas la uzanto de produkto? Kiel la produkto kontentigu la uzanton? Kiuj estas la postuloj de la uzanto? Alivorte: kio estas kvalito de la produkto; kiom 'valoras' la produkto por la uzanto?

Estas utilega sed ofte nefacila ekzerco priskribi la taskon de tiu parto, sekcio, kunlaboranto, ago. Ekzemple jen facila demando: kio estas la tasko de najlo en ĉarpento? Verŝajna respondo estas: kunteni du partojn. Kiom kostas la apliko de najlo? Ne nur la prezo de la najlo mem, sed ankaŭ la enigado de la naĵlo, la risko marteli sur la fingron ktp, kiel eble plej larĝasence! Poste povus veni demando, ĉu eblas alimaniere plenumi tiun taskon, tiun funkcion. Kaze de la apliko de najlo en ĉarpento la demando estus: ĉu eblas alimaniere kunteni du partojn? Oni ofte sukcesas trovi pli efikajn manierojn, kiuj cetere eĉ povas malpli kosti. Kostojn oni ĉiam konsideru kiel eble plej larĝasence! Ne nur mone! Se ekzemple oni proponus toksan gluilon, tiu 'kostus' ankaŭ en la sano, natura medio.

Valoranalizon oni povas vidi kiel:
– metodon por sisteme esplori la rilaton inter unuflanke la kostoj (laŭ ĉiuj aspektoj!) kaj aliflanke la plenumo de la funkcio de konkretaj produktoj aŭ servoj;
– strukturitan procedaron kaj krean teknikaron celantajn 'refari produkton' (larĝasence!) por optimumigi ĝin rilate kostojn, funkciplenumon kaj kvaliton.
Valoranalizo NE celas nuran unuflankan malpliigon de kostoj esprimitaj per monunuoj: tio estas nur unu el la multaj eblaj aspektoj de problemo.

Tia metodo estas utila aŭ necesa, kiam pluraj personoj kunlaboru por serĉi solvon al problemo. Unuopulo serĉanta solvon verŝajne ne tiom multe

profitos el la metodo. Mi ĉiam donis al miaj kunlaborantoj (ni konstruis maŝinojn) la ekzemplon de unuopula entrepreno: la (iama) vilaĝa forĝisto, kiu mem sciis, al kio servos liaj produktoj, ĉar somere li mem uzis ilin surkampe kune kun la aliaj vilaĝanoj, mem 'projektis' (elpensis) siajn produktojn, mem aĉetis la krudajn materialojn, mem prilaboris ilin, adaptis, ŝanĝis, plibonigis sian projekton, mem konis siajn klientojn, mem vendis la produktojn, mem bontenis kaj riparis ilin kaj mem korektis la planojn ofte ekzistantajn nur en lia kapo aŭ krete skizitajn sur la pordego de la forĝejo. La forĝisto mem aŭtomate kunordigis ĉiujn tiujn taskojn.
Ekestas konsiderindaj kunordigaj problemoj, kiam tia entrepreno kreskas, se pluraj personoj specialiĝintaj pri apartaj fakoj devas kunlabori.
Bedaŭrinde jam la simpla kunvivado de homoj foje estigas problemojn! Tiam reguloj, taskopriskriboj, organizado, kunordigado iĝas nemalhaveblaj.

La valoranaliza metodo fakte estas adapto de normala individua pensmaniero al grupoj da kunlaborantoj. Tial necesas kelkaj reguloj pri manieroj de kunlaborado.
Iu estro, nepre sufiĉe potenca superulo, kutime ĉefo aŭ direktoro bone informita pri la problemoj en la sekcio, pri kiu li respondecas, komisias al subuloj, foje al ekstera grupo, serĉi solvon al klare difinita problemo.

Oni kutime distingas en valoranalizo plurajn paŝojn aŭ fazojn, depende de la fonto kaj aplikkampo. La unua apliko de Miles en la aĉetservo de la usona firmao General Electric datiĝas de 1947. La eŭropa normo EN 12973 datiĝas de 2000. Jen ebla skemo:

1. *prepara fazo*: difini la taskon, celon, teamon kaj templimon. Tiun fazon plenumu la estro kunlabore kun la 'sekretario' pri valoranalizo. La eksplicado de la tasko kaj la celo ofte estigas novajn demandojn ĉe la estro, sed ankaŭ ofte okazas, ke per klara eksplicado la problemo simple malaperas! Tial la prepara fazo jam estas valorega ekzerco. La estro starigu la problemon en sufiĉe larĝa, tamen klare limigita kadro. Kutime ne eblas solvi detalon sen tuŝi ĝian ĉirkaŭajon! Aliflanke ne ĉiam estas dezirinde malkonstrui tutan domon por ŝanĝi malgravan detalon.

2. *informa fazo*: kolektado de informoj pri la aktuala situacio. En sufiĉe grandaj entreprenoj specialigitaj servoj liveras informojn al la estro. Ĝenerale la 'sekretario', kiu estu pli aŭ malpli sperta pri valoranalizo, kolektas la informojn. La estro mem informu la elektitajn kunlaborantojn pri la farenda valoranaliza tasko kaj komisiu ĝin al ili.

3. *analiza fazo*: kiom kostas iu 'funkcio'? Ĉar 'kostoj' estu konsiderataj larĝasence, pluraj specialigitaj servoj povas interveni. Gravas, ke neniu 'kosto' estu neglektata. Ankaŭ ekzemple tedeco de iu laboro estas formo de kosto. Ĝi ne estas esprimebla en monunuoj, sed oni menciu ĝin.

4. *krea fazo*: tio estas la generado de ideoj (el kiuj sekvu la solvo!). Tiucele oni kunvenigas kelkajn personojn, certe ne pli ol sep, por generi ideojn per 'komuna cerbumo' (angle *brainstorming*, laŭvorte cerboŝtormo, laŭvortare fulm-ideado) dum antaŭe difinita, limigita tempodaŭro. Unu el ili funkciu kiel sekretario. Li scipovu la metodon, funkciu kiel ordiganto dum la cerbumado kaj notu la ideojn. Kunmeti tro da personoj malutilas – ĉiu ja scias, ke el multaj ĉeestantoj en kunveno, nur malmultaj vere aktivas pri la temo, aliaj ne kuraĝas paroli antaŭ vasta aŭskultantaro, eĉ estiĝas apartaj babiladoj ĝenaj, kaj ĝenerale en entreprenoj kaj organizaĵoj malŝparita tempo de dungitoj multe kostas.
Jen kelkaj gvidlinioj por komunaj cerbumadoj:
– la problemo kaj la atingenda celo estu tute klaraj al ĉiu (se necesas, la sekretario zorgu por pliaj klarigoj);
– la ĉeestantoj sentu sin tute liberaj alporti ideojn (kiujn notu la sekretario): ĉiu ideo – eĉ unuavide stulta – helpas aŭ valoras en ĉi tiu fazo;
– neniu rajtas en tiu fazo negative kritiki aŭ moki ies ideon. Tia sinteno haltigas la idegeneradon;
– la sekretario instigu la kunestantojn 'plupaŝi' laŭ ideoj de kolegoj. Cetere la sekretario ne tro intervenu. Li povas afable memorigi pri la problemo, la celo, la metodo..., prudente starigi demandojn, se li malbone komprenis, ktp. sed devas zorge eviti iun bremsadon de la idegenerado;
– la etoso estu malferma, entuziasma kaj tia, ke generi ideojn estas plezuro. (Mi ofte estis invitata al tiaj cerbumadoj, kaj mi devas konfesi, ke mi tre ŝatis ĉeesti! Cetere mi ofte renkontis la samajn kolegojn, kiuj ankaŭ ĝuis la cerbumadon);
– la cerbumantoj provu sin esprimi prudente, ne aplombe. Demanda formo preferindas: "Ĉu ne eblus...?";
– negativuloj bremsas la idegeneradon kaj nepre ne estu invitataj. Prefere oni ne kunmetu superulojn kaj subulojn en saman grupon, ĉar tia rilato povus bremsi la aferon: subulo ofte iom timetas sian superulon, kiu siavice eble timas ridindigi sin antaŭ subulo;

– ĉiaj kapabloj kaj spertoj estas valoraj. Ia nespecialisteco pri la problemo eĉ ofte dezirindas por generi tute nekutimajn ideojn. Nefakuloj kelkfoje alrigardas problemon el alia starpunkto;
– iom da humuro tre bonvenas! Humuro kaj ludemo aktivigas la cerbon!
Plej ofte estas utile, ke ĉe la fino de la kunsido la sekretario laŭtlegu siajn notojn: tiel li ne nur pretigas sian raporton sed – pli grave – la cerbumintoj jam konsentas pri la enhavo kaj emas elimini eventualajn ŝercojn, stultaĵojn, ... kiuj ja helpis dum la generado de ideoj, sed pri kiuj ĉiu konsentas, ke ili ne estas serioze konsiderendaj. La sekretario, kiu ne ĉiam komprenas la teknikajn flankojn de la afero – li ja spertas pri valoranalizo, sed ne nepre pri la diskutata fako – povas krude noti la gravecon de ĉiu aparta ideo laŭ la takso de la cerbumintoj mem. Ofte iu ideo estis nur intera paŝo al posta. Ne necesas plu konsideri la interan ideon. Gravas, ke ĉiu ĉeestanto tute konsentu pri la notoj! Atentu: tiu fino estas klare apartigenda de la cerbumado mem kaj ne anstataŭas la sekvantan fazon! Ofte ekestas novaj diskutoj kaj ideoj dum la legado de la notoj ĉe la fino: estas la tasko de la sekretario fini ilin ĝustatempe kaj eventuale decidi pri nova kunsido.

5. *valortaksa fazo*: komparo de la valoro de la diversaj proponitaj alternativoj. En sufiĉe grandaj entreprenoj kutime estas apartaj servoj, kie specialistoj pri kostoj, kvalito, sekuro, medio, aĉetado, vendado, ... pristudas la influon al ĉiuj tiuj aspektoj. La restintaj 'seriozaj' ideoj estas pristudataj de la specialigitaj servoj. En la strikte aparta valortaksa fazo la ideoj estu juĝataj de aliaj personoj pri siaj 'valoroj'. Ĉiam 'valoro' havas du aspektojn: unuflanke estas 'kostoj', kiaj estas mono, peno, materialo, energio, domaĝo al la natura medio, aliflanke estas la celita pozitiva rezulto: plialtigo de la kvalito, sekuro, uzeblo, komforto, bonteneblo. La komisiinto decidas pri la enkonduko en la praktikon kaj informas la kunlaborintojn pri la kalkulitaj rezultoj kaj pri sia decido. Tio ofte generas novajn ideojn, modifojn, plibonigojn, kombinojn, ...

6. *enkonduka faz*o: regata enkonduko de la elektita alternativo.

Laŭbezone tiuj fazoj povas esti plurfoje ripetataj. Estas kvazaŭ rotacianta rado: ideoj de aliaj generas novajn ideojn, novajn pensmanierojn. Plibonigoj invitas alie solvi problemojn... Ĉe ĉiu nova rotacio de la rado la organizaĵo povas progresi. Miaopinie la plej grava kaj plej renoviga regulo estas, ke la teamo – kvazaŭ malsaĝiĝinta – generu ideojn sen tuj pripensi,

kiom ili valoras, kiel ili estas realigeblaj, kiom ili kostus. La prijuĝado venos poste en aparta sesio, eble kaj prefere farate de aliaj personoj.
Mi estas emerita inĝeniero laborinta en maŝinkonstruado. Mi precipe memoras la rezulton de valoranalizo, kiun mi devis prezenti al vizitantaro. Temis pri la plej grava kaj peza maŝinparto de tiama peza dratiga maŝino. La okazaĵo instiginta tiun valoranalizon estis la fakto, ke la gisejo (tio estas la firmao, kiu liveras la krudan parton, faritan el gisaĵo) rifuzis plu labori per la malnova tute eluzita modelo. Ni do estis devigitaj decidi, ĉu farigi novan, multekostan modelon laŭ la malnovaj planoj, ĉu reprojekti la parton. Feliĉe niaj kolegoj de la projektejo konsentis pri la reprojektado. Sufiĉis relative malmultaj laborhoroj de tri personoj por atingi tiun rezulton. Mezume oko da tiaj partoj necesis por fari unu maŝinon. Ni reprojektis ĝin interŝanĝebla kun la malnovaj partoj. Jam post la unua serio la postkalkulo de la kostoj montris, ke la malnovaj estis 56% pli multekostaj. Pli grava estis plialtigo de la kvalito, kaj plikontentigo de la klientoj. La kontentaj klientoj de tiu maŝinparto estis niaj propraj muntistoj kaj la prizorgantaj mekanikistoj de la aĉetanto de la maŝino.

Ĉu la metodo povas utili en pedagogio?

Ĝenerale la metodo estas universale aplikebla. Gravegas kunlabori. Estas avantaĝo por la estro: la proponitaj solvoj venas de la subuloj mem, kiuj do verŝajne estos pli entuziasmaj por apliki unu el ili; kaj estas avantaĝo por la subuloj: ili kune trovis la solvojn laŭ komisio de la estro; tiu do pli emos aplikigi solvon proponitan de pluraj subuloj. Estro bone informiĝinta pri la problemoj en sia sekcio povus pripensi la aplikadon de la metodo. La interhomaj rilatoj ĉie ludas gravegan rolon, verŝajne ankaŭ en la pedagogia fako. Instruisto bone informita pri problemoj en sia klaso povas plialtigi la kvaliton de siaj 'produktoj'. Mi provos klarigi per reala ekzemplo.

Dungonte novajn laboristojn mi faris multajn 'teknikajn' interparolojn kun la kandidatoj. Plej ofte temis pri finstudintaj mekanikistoj aŭ elektristoj el teknika lernejo. Mi pridemandis mezume kvin personojn, el kiuj taŭgis nur unu por tasko en nia firmao: jen grava kvalitproblemo ĉe la liveranto, tio estas la lernejo! Mi rakontis la fakton al la direktoro de la plej proksima teknika lernejo kaj proponis al li sendi instruistojn por ĉeesti tian dungan interparolon. La instruistoj rajtis po unu ĉeesti kaj observi, sed ne rajtis interveni. Ili ekkomprenis, ke la belaj teorioj, kiujn ili instruis, havas

malmultan valoron en la realo. Kiom valoras parkerigi impresan matematikan formulon, se la lernanto tute ne komprenas ĝian signifon?

Jen unu el la kutimaj interparoloj, kiujn mi starigis al kandidatoj-mekanikistoj post kvietiga babilado:

"De kie vi venas?"

"De mia hejmo."

"Je proksimume kiom da kilometroj via hejmo troviĝas de ĉi tie?"

"Je kvino da kilometroj"

"Kaj kiel vi venis?"

"Mi venis per biciklo"

"Ĉu vi havas ideon pri la diametro de la radoj de via biciklo?" – Jen unua indiko. Iuj kandidatoj havas sufiĉe bonan ideon pri dimensioj, aliaj tute ne. Kaj fine mia demando: "Ĉu vi povus proksimume kalkuli kiom da rotacioj faris la radoj de via biciklo por veni de via hejmo ĉi tien?".

Feliĉe kelkaj kandidatoj flue solvis la problemeton. Multaj aliaj ne. Inter ili estis junulo atinginta 86% de la poentoj en iu teknika lernejo. Li ŝajnis tre kalma kaj certa pri si mem. Kial li timus kun tiel bona lerneja rezulto? Similaj respondoj estis multaj! La distanco estis 5 km. Li respondis jene: la diametro de la rado estas 600 – mekaniskistoj kutime kalkulas per milimetroj. Do, la radiuso estas 300. Li disponis tabulon kaj kreton. Li ekkalkulis: 2 x 300 x pi... Mi helpis lin dirante, ke anstataŭ pi li rajtis uzi 3, ĉar temas nur pri proksimuma kalkulo. Post kelka tempo li trovis 'sian' solvon: la radoj faris tiom da rotacioj, kiom estas 5 dividite per 18000. Mi puŝis lin kalkuli tiun nombron laŭ la tiam ankoraŭ kutima algoritmo. Li trovis rezulton de 0,00... La junulo eĉ ne vidis la stulton en sia respondo: "vi demandis pri nombro, jen ĝi!".

Tute similan rakonton mi povus fari pri la instruistoj pri fremdlingvoj. Ili neniam vidis frezmaŝinon en la lerneja laborejo. Ili do sendube sciis la nomon de tia maŝino nek en sia gepatra lingvo, nek en la fremda lingvo, kiun ili instruas. Mi tamen opinias dezirinda, ke teknikistoj sciu en la fremda lingvo vortojn pri aferoj, kiujn ili ĉiutage uzas en sia fako.

Evidentiĝis, ke en la lernejo tiutempe, eble ankoraŭ nun, pro 'la sistemo', ekzistas strikta apartiĝo de ĉiuj apartaj fakoj. Ĉiu instruisto instruis sian propran fakon, kvazaŭ ĝi estus la sola. Cetere la instruistoj pri laboreja praktiko ne havis samgradan diplomon, kaj tio kreis ian interhoman distancon. Aliflanke, mi havis la impreson, ke instruistoj de neteknikaj fakoj iom timas eniri la lernejan laborejon, ĉar tie ili sin sentis malcertaj,

nespertaj, iom stultaj. Kompreneble! En la laborejo eĉ la malplej saĝa lernanto estis multe pli lerta pri tekniko ol la instruisto de neteknikaj fakoj.

Interhomaj rilatoj treege gravas en ĉia entrepreno! Solvi teknikan problemon estas relative malgranda tasko kompare al la tasko bone kunlaborigi homojn! La valoranaliza metodo povas helpi.

La instruistoj ĉeestintaj dum niaj dungaj interparoloj raportis pri tiu sperto al sia direktoro, kiu ekde tiam ekkredis min kaj faris aranĝojn por redifini la realan kvaliton de siaj produktoj. La direktoro povintus diri: "Jen la ministeriaj gvidlinioj. Ni plenumas ilin. Tio sufiĉas! Ni ne estas devigataj fari ion pli". Feliĉe tiu ĉi volis plialtigi la realan kvaliton. Li vidis la problemon. Li organizis la kunlaboradon de siaj instruistoj kaj li sukcesis.

Ĉu eblas apliki la metodon kunlabore kun lernantoj? Pri tio juĝu la pedagogoj mem! Mi supozas, ke tia valoranaliza sesio povus esti por ili interesa kaj fruktodona leciono. Jen ekzemplo: Kiel organizi horon/tagon/okazontaĵon pri lingva kaj kultura diverseco okaze de la Lingvotago?

Eksperimenta serĉo pri lingvaj malfacilaĵoj[4]

de Graziano Ricagno



Prezentado de la esploro

Laŭ ĵusaj statistikoj en Italio minimume 4-5 %-oj de la lernantoj havas malfacilaĵojn pri lingvo-lernado: pri la itala aŭ pri fremdaj lingvoj. Tio okazas pro multaj kialoj; ĉi tie ni konsideru nur la problemojn devenantajn el malfacila rilato inter fonemo kaj grafemo, tio estas inter skribita litero kaj ĝia sono. Laŭ kiu ajn metodo oni lernas/instruas iun ajn lingvon alvenas momento kiam oni devas skribi tion kion oni aŭdas/parolas. Tiam povas aperi eraroj pro manko de taŭga konformeco inter sono kaj skriba signo. La infanoj lernas la taŭgan skrib-

[4] Membro de la *Scienca Komitato* legis ĉi tiun artikolon antaŭ la aperigo kaj konsilis forigi parton de ĝi (pri malsamaj elparoloj de la litero *s*), pri kiu la rezultoj ŝajnas dependi ankaŭ de aliaj faktoroj.

manieron de la vortoj ne nur per lernado en lernejo sed ankaŭ per kutimo, per kondiĉitaj refleksoj, vidante ilin skribitaj ie ajn en gazetoj, en televidilo ktp.; temas pri natura metodo, ekzemple, dum la plurjara lernado de la patrina lingvo. Sed post tiu longa instruado iufoje dum la skribado la lernantoj povas erari; tio pli ofte okazas ĉe malfacilaj aŭ nekonataj vortoj aŭ en fremdaj lingvoj kaj povas okazi ĉe malsanuloj havantaj multspecajn problemojn sed ankaŭ ĉe sanuloj. La infanoj evidente malbone lernis la taŭgajn mekanismojn. E-o, fonetike tute konsekvenca, havas la avantaĝon, ke la prononco estas rapide instruebla pro konformeco inter litero kaj ĝia sono; sed, se mankas la eblo ekspluati la konformecon, kie estas la avantaĝo?

Homoj kaj metodo

Por esplori la gravecon de tiu ĉi problemo, mi realigis etan eksperimentan esploron per iomete malfacilaj provoj: kapablo de distingo inter la du sonoj de tri italaj leteroj: *c* (en la itala legenda *ĉ* aŭ *k*), *g* (legenda *g* aŭ *ĝ*) kaj *s [vd. la piednoton – NdlR]*. Por pliprofundigi la observadon, la laboro okazis individue. Temas pri 92 italaj geknaboj (42 knabinoj kaj 50 knaboj), inter 10- kaj 17-jaraĝaj, ĉe kiuj mi ekzamenis nur la fonetikajn problemojn. Ili estis korpe sanaj kaj normale inteligentaj laŭ mensaj testoj. El la esploro mi forlasis malsanulojn, kies malfacilaĵoj ne taŭgas por tiu ĉi esploro, ĉar ili donus miskompreneblajn rezultojn. La tasko estis: reskribi liston de vortoj disigante tiujn enhavantajn unu sonon disde la aliaj havantaj la alian sonon de la litero. Por ĉiu litero la slipoj estis du; la dua estis proponita al la lernantoj kiuj ne perfekte respondis dum la unua provo, por kontroli eventualan pliboniĝon akiritan post la unua provo.

Slipoj

Reskribu la surslipigitajn vortojn disigante tiujn enhavantajn la '*c*' kiel '*ciao*' (pron: *ĉao*) de tiuj enhavantaj la '*c*' kiel '*cane*' (pron: *kane*) (ĉi tie parte substrekitaj).

1) c-c	2) c-c
Cane	Cosa
Cassa	Facile
Cibo	Maniche
Cuore	Ciabatte
Faccia	Schiena
Parco	Qualche
Fucile	Quercia

Pancia	Fischio
Capo	Distacco
Uccello	Cimice
Colore	Acciughe
Perché	Psicologia
Amico	Educazione
Chiave	Processo
Bici	Oscurità
Giocare	Precedente
Ciliegia	Lumaca
Cubo	Fosco
Bacio	Pacco
	Venticinque

Reskribu la surslipigitajn vortojn disigante tiujn enhavantajn la '*g*' kiel '*gioco'* (pron: *ĝoko*) de tiuj enhavantaj la '*g*' kiel '*gatto'* (pron: *gatto*) (ĉi tie substrekitaj).

1) g-g	2) g-g
Giostra	Sangue
Giro	Navigare
Gomito	Regione
Raggio	Magico
Gamba	Singhiozzo
Riga	Gironzolare
Pagina	Guidare
Pagare	Piangere
Giubbino	Spaghetti
Strega	Spiaggia
Funghi	Rigore
Giraffa	Stringhe
Figura	Fagioli
Orologio	Pigiama
Gelato	Gomitolo
Giocare	Giacca
Bigio	Collegare
Drago	Pappagallo
Valigia	Giallastro
Cugino	Pagella

Rezultoj

		c-c 1	c-c 2	g-g 1	g-g 2
Nombro de knaboj		*87*	*45*	*92*	*50*
Ekzakta respondo	*Nombro* Procento	*42* 48,2 %	*20* 44,4 %	*42* 45,6 %	*22* 44,0 %
Bona respondo	*Nombro* Procento	*29* 33,3 %	*18* 40,0 %	*44* 47,8 %	*21* 42,0 %
Erara aŭ necertega respondo	*Nombro* Procento	*16* 18,4 %	*7* 15,5 %	*6* 6,5 %	*7* 14,0 %

„Ekzakta respondo" signifas tute seneraran, „bona respondo" signifas unu aŭ du erarojn aŭ senerarecon per helpo de la instruisto. „Erara respondo" signifas malkapablon solvi la problemon.

El la rezultoj prezentitaj en la tabelo, ĉe la unua provo ni vidas perfektecon preskaŭ ĉe unu duono de la homoj (provo c-c1 kaj g-g1), sed altan elcentaĵon de malfacilaĵoj, iujn negravajn (33,3; 47,8; 19,5) kaj iujn gravajn (18,4; 6,5; 44,5); dum la dua provo nur kelkaj pliboniĝas, ĉar ĉe c-c2 kaj ĉe g-g2 ankoraŭ 7 erarintoj tute eraras.

El la rezultoj de tiu ĉi loka esploro oni ne povas eltiri ĝeneralajn konkludojn; sed per kvantaj informoj ili pruvas ke ĉe sanuloj fonetikaj malfacilaĵoj eble estas pli oftaj ol atendite kaj ke la tradicia instrumetodo de la prononco per fonetikaj reguloj povas malsukcesi pro manko de bazaj antaŭkondiĉoj.

La instruistoj povas solvi tiujn problemojn per specifaj instrumetodoj, kiuj ne estas temo de tiu ĉi artikolo. Tie ĉi oni pripensas la centojn de folietoj, gramatiketoj, afiŝetoj kiujn ni esperantistoj disdonas por propagandi nian lingvon.
Unu el la virtoj de Esperanto, kiun ni ĉiam elmontregas, estas la facileco de ĝia fonetiko, kiun multaj, sed bedaŭrinde ne ĉiuj povas ekspluati.

Ĉu ni devas eltrovi pli taŭgan manieron por diskonigi E-on?

Graziano Ricagno, <graziano.ricagno@libero.it>

Esperanto liveras ilaron por leksikokerna esploro

de Probal Daŝgupto

La *Lingvistika Esplorejo* ene de la *Barata Statistika Instituto* en Kolkato (malnova nomo "Kalkato") entreprenas leksikan esploron de nova tipo, en kiu rolas E-o. Ni, kiuj laboras en tiu esplorejo, komencos ekde aprilo 2007 krei tekstare bazitan elektronikan vortaron de la bengala lingvo indikontan la rilatojn inter kernaj kaj periferiaj vortoj. Kiel tio ĉi rilatas al nia interesiĝo pri la pedagogio?

La kerno de la bengala estas tio, kio plej facilas, kaj kion do plej frue lernas bengalaj infanoj, plej facile lernas fremdaj lernantoj, plej ofte uzas la ĝenerala tekstaro, ktp. Estas periferiaj aŭ malkernaj la vortoj, kiuj estas ekster aŭ for de la kerno. Sed la ligoj inter la kernaj vortoj kaj la malkernaj estas ofte specifeblaj per Esperantaj afiksoj. Al la bengala kerna vorto /*sojjhokaraa*/ 'toleri' parencas la malkernaj vortoj /*sahonsil*/ 'tolerema', /*sahonsilotaa*/ 'toleremeco', /*sahonsilotaabihin*/ 'sentoleremeca'. Ĉi tie eĉ en la bengala oni vidas diafanan afiksan strukturon bazitan sur la klera, jam malkerna varianto /*sahon*/ 'tolero' de la verbo. Sed rigardu la vortojn bazitajn sur /*iaarki*/ 'ŝerco', kiel /*faajil*/ 'ŝercema' kaj /*faajlaamo*/ 'ŝercemeco'. Kvankam iuj morfofonologiaj analizoj povas teorie rilatigi /*faajil*/ al /*faajlaamo*/ pere de forviŝo de la interna vokalo, tia analizo ne havas sufiĉe da ĝeneraleco por pravigi instrukcion al la komputilo detekti la parencecon; ĝi estas do duondiafana. Kaj la senca parenceco inter /*faajil*/ 'ŝercema' kaj /*iaarki*/ 'ŝerco' estas evidente tute netravidebla.

Se ni uzas Esperantajn glosojn por elstarigi la intervortajn rilatojn, ni povas atingi sisteman superrigardon, kiu helpos ĝeneraligi niajn rezultojn al aliaj sudaziaj lingvoj, kiujn nia projekto esperas inkluzivi en estontaj vastiĝoj. Rimarku, ke tiucele oni devas uzi relative klasikan E-on, kaj do diri "toleremeco" anstataŭ "toleremo" en unu el la ĵusaj ekzemploj.


La utilecon de tia uzo de E-o kiel interleksika studilo reliefigis mia festparolado okaze de la kvindekjariĝo de *Fondumo Esperanto* en Helsinko en oktobro 2005. En tiu parolado, mi emfazis, ke jam establiĝis specifaj laboriloj por la fonetiko, la sintakso kaj la semantiko – respektive, la internacia fonetika alfabeto, la arba notado kaj la matematika logika simboluzo; kaj ke estas nature proponi, ke ankaŭ la leksikologio havu propran notadon, ekzemple E-on. Nun mi estas kontenta povi raporti, ke en mia profesia vivo mi lanĉas tiuvojan projekton.

En Barato multaj socitavoloj atingas la socian liberecon kaj klerecon nur nun. Ekzemple la dalitoj (la eksnetuŝebluloj en la hindua kastosistemo) komencas nur en la ĵusaj generacioj grandskale kleriĝi, eniri la universitatnivelan legadon kaj verkadon kaj okupi seriozajn oficojn. Ili ofte, precipe en siaj lernejaj kaj universitataj jaroj, bezonas rapidan helpon pli grandskale, ol efektivaj apuduloj povas doni. Nia lando aparte devas do konstrui elektronikajn helpilojn. Devas ekzisti rimedoj, per kiuj dalito bezonanta legi malfacilan tekston povu enŝalti specialan klarigilon, kiu rigardas malfacilan vorton aŭ frazon kaj tradukas ĝin en facilajn pecojn pere de sistema kompreno pri la rilato inter la kerna kaj la malkerna partoj de ĉiu lingvo. La nun lanĉata projekto estas vidata kiel komenco de tia pli granda entrepreno. Certe ne nur dalitoj en Barato povos profiti de io tia, ĉu ne? Viaj komentoj bonvenas.

Probal Daŝgupto, <probal53@yahoo.com>

Intervjuo kun Detlev Blanke, vicprez. de SK de IPR

La demandaron kompilis: Katalin Kováts



Kiam kaj kiel vi esperantistiĝis? En kiu tereno de la movado vi aktivis komence?

Mi ekesperantistiĝis kiel gimnaziano en la jaro 1957, do antaŭ duonjarcento. Mi estas aŭtodidakto (lernis laŭ germana eldono de sveda lernolibro de *Frits Lindén*), sed havis "mentoron", kiu estis simpla laboristo (masonisto), *Franz Tischer* el Magdeburg. Pro malfacilaj biografiaj kialoj li frekventis nur tri lernejajn klasojn. Li ne kapablis skribi eĉ unu solan germanan frazon sen amaso da eraroj. Sed li brile skribis kaj parolis E-on kaj severe korektis miajn leterojn. Per tiu lingvo li akiris iun rimarkindan klerecon. Tio tre fascinis min. En tiu tempo jam okazis la unuaj aktivaĵoj en GDR por atingi la oficialiĝon de E-o. Ja post la persekutoj sub Hitler kaj Stalin en la orienta parto de Germanio la Esperanta tradicio estis tranĉe interrompita. Regis granda malfido pri E-o. En tiu unua tempo mi nodis multajn kontaktojn kun spertaj esperantistoj en GDR, iamaj membroj de la *Germana Laborista Esperanto* kaj kun aliaj personoj, ankaŭ kun studentoj,

el kiuj multaj poste fariĝis membroj de la centra gvidorgano de la GDR-esperantistoj. Kompreneble mi ankaŭ varbis por la lingvo kaj gvidis kursetojn. Samtempe mi kolektegis materialojn sub la temo "Esperanto en teorio kaj praktiko", por havi bonan bazon nutrantan efikajn argumentojn, ĉar siatempe la skeptiko kaj nescio pri E-o, ofte ligita kun emo al ridindigo, kompreneble estis tre granda.

Ĉu vi iel aktive partoprenis la oficialigon de E-o en GDR?
Jes. Tiu oficialiĝo okazis en 1965, en la kadroj de intelektula kultur-organizaĵo (*Kulturligo*). Kiel juna instruisto por la germana lingvo (1965-68) en 1965 mi fariĝis prezidanto de la regiona esperantista suborganizaĵo en *Kulturligo* (Rostock, kaj ĉirkaŭo ĉe la Balta Maro) kaj eniris la centran honorofican gvidantaron en Berlin. En 1968 mi estis vokita al la ĉefoficejo de *Kulturligo* en Berlin kaj eklaboris profesie por E-o. Kun 27 jaroj mi estis la plej juna faka respondeculo en la tuta ĉefoficejo. Subtenate de bonegaj kaj spertaj esperantistoj mi klopodis kunkonstrui solidan bazon por la laboro de la esperantistoj en GDR. Mi tie laboris ĝis majo 1991, kiam pentekoste okazis la unuiĝo de "E-Asocio en Kulturligo de GDR" kun "Germana E-Asocio".

Kiun rolon havas E-o kiel komunikilo kaj hobio en via privata vivo?
Kiel vi vidas el la supra respondo, mi fariĝis profesia esperantisto, por kiu estis malfacile distingi inter profesia kaj privata vivoj. Por la profesia agado mi havis idealajn teknikajn kaj homajn kondiĉojn en *Kulturligo*. Kompreneble, ankaŭ private mi ĝuis la multajn interesajn kontaktojn kun inspiraj esperantistoj el la tuta mondo. Grandan parton de miaj aktivaĵoj mi povis kaj povas realigi kune kun mia edzino *Wera*. Tion mi tre ĝuas. Sen ŝi multego ne ekzistus. Nun, kiel 65-jarulo kaj pensiulo, kiu rerigardas en la pasintecon, mi povas diri, ke E-o tre riĉigis mian vivon. Estas tre longa la listo de homoj, al kiuj mi ŝuldas dankon.

Vi estas ankaŭ diplomita instruisto; ĉu vi mem gvidis Esperanto-kursojn, instruis la lingvon?
Inter 1965-1968 en la norda regiono de GDR mi faris multajn prelegojn, skribis artikolojn kaj klopodis organizi. Tiam mi ankaŭ gvidis diversajn kursojn, aparte en la ĉe-baltmaraj urboj Wismar kaj Rostock. Mi kompreneble estis nesperta kaj memoras, ke tre helpis min la dialogoj de *Andrzej Pettyn*.

Via nomo ofte legeblas rilate al esperantologiaj temoj, konferencoj, studoj kaj eldonaĵoj. Kiam vi ekokupiĝis pri interlingvistiko kaj esperantologio kaj kiuj estas viaj plej gravaj kaj memorindaj atingaĵoj/ publikaĵoj sur tiu tereno?

Interlingvistiko kaj esperantologio min jam interesis, kiam mi estis studento. En 1964 mi okazigis la unuan interlingvistikan kolokveton en la Universitato de Rostock, kun partopreno de kelkaj gravaj lingvistoj. Tio kuraĝigis min. Aparte influis min la skribaj kaj personaj kontaktoj, kiujn mi havis i.a. kun *Eugen Wüster, Evgenij Bokarev* kaj *István Szerdahelyi*. Tre helpis min i.a. la profesoroj *Viktor Falkenhahn* kaj *Georg Friedrich Meier*. Laborante en *Kulturligo*, ĉefe intelektula organizaĵo, de miaj ĉefoj mi havis ĉiun subtenon por – paralele al la fake-administra laboro – konstrui al mi sciencan karieron. Mi doktoriĝis (1976) kaj habilitiĝis (1985) pri interlingvistikaj temoj (la unuaj en GDR) ĉe Humboldt-Universitato kaj estis ministerie nomumita "Honoraria docento pri interlingvistiko", faris prelegojn en la universitato ktp... Miaj atingaĵoj? Nu, eble aliaj menciu miajn "atingaĵojn"... Sed por resti ne tro modesta: krom la organizado de eble 40 sciencaj aranĝoj kaj prezento de ĉ. 230 prelegoj antaŭ akademiaj aŭskultantaroj (ankaŭ prelegvojaĝe eksterlande), kiujn mi realigis, eblas mencii kelkajn librojn kaj abundon da diverslingvaj studoj. De 1988-2006 mi preskaŭ regule prelegis en Humboldt-Universitato, kion mi tre ĝuis.

Antaŭ kvin jaroj omaĝe al via 60ª naskiĝtago aperis grava kolekto de interlingvistikaj studoj, redaktita de* Sabine Fiedler *kaj* Liu Haitao*. Kion por vi signifas tiu libro kaj la omaĝantaj kontribuintoj?

Jes, tiu omaĝa festlibro (736-paĝa), redaktita de du (tre diversregionaj!) unuaklasaj interlingvistoj, tre surprizis min pro enhava riĉo kaj amplekso. En ĝi ni trovas 43 eseojn de interlingvistoj el 19 landoj, vere bela bukedo. Ĉiujn kontribuintojn mi bone konis dum multaj jaroj, kunlaboris (-adas) kun ili kaj de ili multe lernis. Iliaj eseoj por mi estas granda honoro.

Laŭ via opinio kiun rolon devas havi interlingvistiko en la laboro kaj agado de E-instruistoj, kaj kion vi persone povas fari/faras/faros en tiu kampo kadre de ILEI kaj estante la vicprezidanto de la* Scienca Komitato de IPR*?

Por mi ĉiam gravis la unueco inter teorio kaj praktiko. Scienco ofte helpas al gravaj decidoj, kiuj havas praktikajn efikojn. Sed sen atento al la praktiko la sciencistoj povas veni al dubindaj konkludoj… Laŭ mi bonaj

profesinivelaj instruistoj de E-o bezonas solidajn sciojn pri interlingvistiko kaj esperantologio. La malmulta vendo de tiutemaj libroj bedaŭrinde supozigas nur malgrandan intereson. La instruistoj ja ne nur instruu iun komunikan kodon kaj ties praktikajn apliko-eblojn. Ili ja konsciu, ke ili instruas la konkretiĝon de malnova homara revo, kiu – kvankam malgrandskale – bonege funkcias. Per ĝeneralaj propagandaj sloganoj – la plej facila lingvo kun 16 reguloj, supera eĉ al naciaj lingvoj kaj simile – ni ne atingos tiujn homojn, kiujn ni bezonas. Mi timas, ke miaj superŝarĝoj verŝajne ne permesos al mi tiom multe agadi en kaj por ILEI, kiom mi dezirus. Tamen, mi ĉiam estas malferma al konkretaj proponoj.

Ĉu ion eblas scii pri viaj lastaj agadoj, sekvaj planoj?

Danke al la simpatia premo de *Sabine Fiedler* (kiu redaktis) en 2006 en prestiĝa scienca eldonejo aperis mia lasta libro kun 14 interlingvistikaj eseoj, bedaŭrinde en la germana (*Interlinguistische Beiträge*. Frankfurt/ Main, 2006, 405 p.). Mi planas kelkajn pluajn volumojn kun kolektitaj eseoj. Lastatempe aparte grava por mi estis la fiksado de faktoj pri la E-movado en GDR. De 1997 ĝis 2006 mi gvidis tiucelan historian komisionon, en kiu pli ol 20 personoj produktis ĉ. 4000 paĝojn, publikigitajn en diversaj revuoj kaj libroj aŭ aperintajn kiel binditaj manuskriptoj, parte sur diskedoj. Tio ŝajnas al mi tre necesa, ĉar mi de tempo al tempo observas misprezentojn de la agado de la esperantistoj ne nur en GDR, sed ankaŭ en aliaj orientaj landoj. Tio estas ofendo kontraŭ multegaj saĝe, honeste kaj senlace laborintaj personoj. Tio ankaŭ estas la kialo por broŝuro, kiun mi verkis pri la temo ("*Esperanto kaj socialismo?*"). Gravega kaj tre trankviliga atingo por mia edzino Wera kaj mi estas la fakto, ke la ŝtata arkivego de Germanio kontrakte sin devigas transpreni nian grandan bibliotekon kaj arkivon. Post la transpreno je fiksenda dato aŭ okazo ĝi estos publike alirebla kaj post nia malapero eble helpos al junaj esploristoj pli rapide, ol ni siatempe povis, eniri la fascinajn kampojn de interlingvistiko kaj esperantologio. La pretigo de tiu arkivo, la aperigo de kelkaj volumoj kun miaj dissemitaj eseoj kaj la subteno de junaj esploristoj apartenas al miaj ĉefaj planoj por la estonteco.

Koran dankon por la intervjuo. El la nomo de ĉiuj konsciaj esperantistoj ni dankas vin ambaŭ por la farita laboro kaj deziras al vi sanon, longan vivon ankaŭ por realigi viajn planojn.

Esperanto en mia vivo[5]

de Géza Kurucz, Hungario



Antaŭ 50 jaroj mi konatiĝis kun E-o. Tiutempe, tuj post la abiturienta ekzameno mi laboris en Budapeŝta teatro „*Madách*" kiel kulisisto. En liberaj antaŭtagmezaj horoj mi ofte vizitis la ĉefbibliotekon, kaj en iu somerfina tago pruntis, kvazaŭ hazarde, E-lernolibron. Legante ĝin mi estis pli kaj pli ravita pro la simpleco kaj logikeco de la lingvo kaj – malgraŭ tio, ke mi ĝis tiam interesiĝis nur pri natursciencoj kaj havis nur malsukcesojn en lingvolernado – decidis lerni la lingvon, sciante nenion pri tio, ĉu ekzistas ankoraŭ esperantistoj (la libro, kiun mi pruntis el la biblioteko, aperis fine de la 19a jarcento). Danke al E-o, kiun mi alproprigis sufiĉe bone en duonjaro, mi fariĝis poste lingvo-instruisto kaj ĝuanto de lingvistiko.

Ĉar mi ĉiam ankoraŭ sciis nenion pri la tiutempa E-movado, mi decidis skribi leteron al la *Hungara Radio* kaj petis ilin sciigi min pri hungaraj esperantistoj, se ili havas informon pri tiuj „silentemaj" estuloj. La redakcio de la *Radio* estis tre afabla. Post unu semajno alvenis letero kun ĝojiga enhavo. Laŭ ilia informo esperantistoj ĉiusemajne kunvenas en Budapeŝto (preciza adreso estis donita). Tiutempe mi jam loĝis en Kecskemét (86 km de Budapeŝto) kaj post kelkaj tagoj mi prenis biciklon kaj ekiris por trovi la unuan vivantan esperantiston. Kaj ĉu vi scias, kiu estis tiu? *Julio Baghy*, nia „paĉjo". Li afable akceptis min, donis la necesajn informojn kaj adreson de unu aktiva Budapeŝtano, kiu poste akceptis min hejme kun granda ĝojo kaj helpemo. De li mi ricevis vortaron, kelkajn gazetojn kaj li malkaŝis, ke *Radio Romo* regule dissendas Esperantan programon. Tio donis al mi perspektivon kaj ligis min al la mondo. Mi ekkorespondis kun rusino, estono, germano kaj ĝuis, ke malfermiĝis antaŭ mi la mondo.

[5] Fine de julio 2006 laŭ la decido de la Komitato de ILEI dum la 39-a Konferenco en Parmo *s-ro Géza Kurucz* iĝis Honora Membro de ILEI. Ankoraŭfojan gratulon al li! Okaze de tio, kaj laŭ nia peto, li en artikola formo resumis por ni kian rolon Esperanto havas en lia vivo.

Tamen, pli ol la struktura klareco kaptis mian koron la demokratiismo, kiu estas nedisigebla esenca parto de la lingvo. E-o estas por mi multe pli ol unu el la ekzistantaj lingvoj. Antaŭ ĉio ĝi estas ideo nobla, kiu dum marĉoplena jarcento ne malpuriĝis, ne kompromitiĝis. Tiu ĉi pontlingvo interligas ne lingvajn surdmutulojn, sed antaŭ ĉio kaj ĉefe homajn korojn. Miaopinie vera esperantisto distingiĝas ne nur per parolkapablo de la Internacia Lingvo, sed ankaŭ per malfermiteco al homaj suferoj kaj maljustaĵoj. Sindona adepto de la neŭtrala komunikilo deziras aktive – ne per buŝo, sed per agoj – fari ion utilan por siaj homfratoj. Mi esperas, ke multaj el vi pro tio laboras por Esperanto.


Sed ni revenu al la komenco. Fininte la universitatajn studojn, en 1962 mi ekinstruis en mezgrada lernejo de Kecskemét kaj baldaŭ komencis gvidi Esperanto-kursojn kaj en la gimnazio kaj en la urba kulturdomo. Post unu jardeko, t.e. en la jaro 1972, mi iniciatis facillingvan E-periodaĵon por lernejanoj, ĉar ĝis tiam malaperis la iamaj periodaĵoj („*La Juna Vivo*", „*Juna Esperantisto*", „*Pioniro*", „*La Praktiko*") kaj mi multe sentis la mankon de celtaŭga legomaterialo. Helpe de ILEI kaj HEA aperis la provnumero de *Juna amiko* jam en novembro de la sama jaro. De tiu tempo ĝis hodiaŭ pli-malpli regule ni eliras tri aŭ kvar fojojn jare, komence en amplekso de 24 paĝoj (de formato A/5), kaj ekde la jaro 2005 kun plenkoloraj kovriloj sur 52 paĝoj. Nuntempe ni havas kunlaborantojn en 19 landoj de ĉiuj kvin kontinentoj. La nombron de la kontribuantoj estus tre malfacile kalkuli, praktike en la redaktado partoprenis/as esperantistoj el la tuta mondo. Nu, pri tio mi estas fiera.

En 1989, kiam E-o fariĝis libervole elektebla lernobjekto en la hungaraj lernejoj, mi lanĉis tutlandan kvizoludon por baz- kaj mezlernejanoj, kiu poste iĝis internacia pere de *Juna amiko*. Kiel aktivaj kunlaborantoj multe helpis s-ino *Raita Pyhälä* el Finnlando, *Marija Belošević* el Kroatio kaj s-ro *Dieter Berndt* el Germanio. Mi estas tre dankema al ili. En la kuranta jaro tiu ĉi konkurso renoviĝos kaj provos aktivigi la tutan legantaron de *Juna amiko*.

Mi deziras fermi la artikolon kun firma konvinko: mi fidas la sobrecon de la homaro kaj kredas, ke post longa, persista agado estos atingebla ankaŭ nia celo. Ne forgesu la historian sperton: nur celkonsciaj idealistoj povas kaj devas antaŭenpuŝi la homaron.

Biografietoj de la membroj de la Scienca Komitato

(IV-a, fina parto)



Boris Kolker (Rusio/Usono)
Naskiĝis en 1939. Diplomiĝis pri la rusa kaj franca lingvoj en la Ŝtata Universitato de Kiŝinev (Moldavio, Sovet-Unio) en 1962. Doktoriĝis pri lingvoscienco en 1985 per disertacio pri esperantologia temo. Instruis en mezaj kaj superaj lernejoj. Plejparton de la vivo laboris kiel tradukisto de scienc-teknika literaturo el kelkaj lingvoj. Esperantistiĝis en 1957. Membro de la Akademio de E-o. Honora membro de UEA. Kunredaktoro de "Monato". Membro de EVA. En diversaj tempoj kunfondinto kaj kungvidanto de landaj E-organizaĵoj en Sovet-Unio kaj Rusio, komitatano de TEJO, membro (ekde la jaro 1959), komitatano kaj ĉefdelegito de UEA. Aŭtoro de du popularaj E-lernolibroj por ruslingvanoj kaj de la internacia lernolibro "*Vojaĝo en Esperantolando. Perfektiga kurso de E-o* kaj *Gvidlibro pri la Esperanta kulturo*", de interlingvistikaj artikoloj kaj recenzoj. Plurfoje instruis per Cseh-metodo. Dum du jardekoj gvidis amasan korespondan kurson en Rusio, en kiu diplomiĝis preskaŭ 900 personoj. Estis respondeculo pri E-instruado en Sovet-Unio kaj Rusio, kreis kaj gvidis tie Ĉefan Atestan (= ekzamenan) Komisionon. Instruis E-on ĉe usonaj universitatoj en San Francisko kaj Hartford. Nun gvidanto de la *Internacia Perfektiga Koresponda Kurso* (IPKK). Vicprezidanto de la *Internacia Ekzamena Komisiono* (IEK) de ILEI/UEA. Kvankam mia subskribo troviĝas sur centoj (miloj?) da Esperantaj diplomoj, mi mem ne havas iun ajn E-diplomon, eĉ ne pri la elementa kurso.



Aleksandro S. Melnikov (nask. en 1951, ruso)
Diplome, kvalifike, postene: Rostova universitato (kemio), Pjatigorska fremdlingvo-instruista supera lernejo (angla lingvo); diplomita Cseh-instruisto; doktoro hab. de filologio, estras la katedron de fremdaj lingvoj ĉe akademio de agrikultura maŝinkonstruado;
Movade: Esperantisto ekde 1965; prezidinto de Sovetia E-Junulara Movado, vic-prezidinto de SEU (tutsovetia

E-asocio antaŭ REU), TEJO-ekskomitatano, UEA-ĉefdelegito por la iama Sovet-Unio; nuna delegito en Rostovo; “Rusia e-isto de la jaro 2004”;
Kursgvide kaj ekzamene: Ekde 1968 (tiam mem lernejano) gvidis E-kursojn (ekde 1986 laŭ la propra metodiko "*Instruado - sen turmentado*!") en pluraj urboj de Sovetio, Luksemburgio, Norvegio, Aŭstralio, Britio, Germanio, Nederlando, Usono; aktuala membro de la *Supera Atesta Komisiono de la Rusia E-Unio* kaj de la *Internacia Ekzamena Komisiono* (de la lasta mi ne havas konfirmon pri la aktualeco);
Aŭtore: Verkis en la rusa kaj E-o dekon da libroj kaj broŝuroj, inter kiuj:

- *"Specifaj kulturaj scioj de la esperantista kvazaŭetno kaj ilia respegulĝo en la koncerna lingv(aĵ)o"*;
- "*Instruado - sen turmentado!" La ĉefaj principoj de fremdlingvo-instruado kaj praktikaj konsiloj por E-kursgvidantoj"*; ĉi tiu libro estis inter la plej vendataj ĉe la UEA-Libroservo en 2000; estas preparataj metodikaj materialoj por E-kursoj;
- “*Lingvokulturologiaj aspektoj de internaciaj planlingvoj (fone de la etnaj)*”; habitiliĝa 631-paĝa scienca monografio en la rusa lingvo;
- *"Portreto de ideo kun malordinaruloj anstataŭ fono, aŭ La lingvo de doktoro Esperant-a*”; titolpaĝe: "Rusia akademio de edukado – Suda filio – Eldonejo de la Rostova ŝtata pedagogia universitato", ruslingva leĝerstila;
- lernilo por progresantaj ruslingvanoj “*E-o por harfenduloj*”, parto 1;
- *Artikoloj kaj eseoj:* sciencaj kaj ĝeneral-klerigaj artikoloj pri interlingvistiko, E-o, E-movado, instru-metodiko k.a. temoj aperis ruse kaj E-e en periodaĵoj kaj artikolaroj Sovetie, Rusie kaj eksterlande (Aŭstralio, Britio, Ĉeĥio, Irano, Japanio, Nederlando, Pollando). La eseo “*Ekparolu, por ke mi vin vidu, aŭ Ĉu esperantisto rekoneblas laŭ paroloj*” ricevis la premion “Luigi Minnaja” de la Belartaj Konkursoj-2006;

Prelege: Preleginto pri interlingvistikaj, esperantologiaj, E-movadaj kaj E-metodikaj temoj ĉe la Tartua, Minska kaj Florenca universitatoj, ILEI-konferenco en Kerkrade, konferencoj en Brajtono kaj Prago, AIS-sesio en San-Marino, Monaŝa universitato (AU); Ĉuvaŝaj lingvistikaj konferencoj (Ĉeboksaro, Ĉuvaŝio), kadre de naciaj E-kongresoj kaj aliaj E-aranĝoj, en E-kluboj de Aŭstralio, Belgio inkluzive Flandrion, Britio inkluzive Skotlandon, Ĉeĥio, Danlando, Francio, Germanio, Hispanio inkluzive Katalunion, Italio, Japanio, Luksemburgio, Nederlando, Usono.
Patre: Edukis denaskan esperantistinon.

Maŭro La Torre



Naskita en 1946 en Romo (Italujo), kie li ankoraŭ loĝas, li esperantistiĝis en 1962, kaj estis estrarano de IEJ (Itala E-Junularo) en la '60-aj jaroj. Doktoriĝis pri matematiko en 1974 en la Roma Universitato "*La Sapienza*" kun disertaĵo pri matematika lingviko. Li instrukapabliĝis pri E-o (1966) kaj pri Matematiko kaj Natursciencoj (1976). Ekde 1974-a dum 15 jaroj instruis en bazlernejoj, samtempe laborante por instruista trejnado, en la kampoj de matematika kaj komputika didaktiko kaj de bazlernejaj reformoj, kunlabore kun la itala instruista asocio CIDI kaj kun la itala *Ministerio pri Publika Instruado*. Ekde 1987 laboras en la *Pedagogiscienca Laboratorio de la Klerigscienca Departemento de la Tria Roma Universitato*, pri aŭtomatigo en ekzamenado, instru-teknologioj, teleinstruado, komputiko, lingva statistiko, terminologio, lingvopolitiko. En tiuj kampoj publikigis plurajn verkojn. Nuntempe, kiel profesoro pri Eksperimenta Pedagogio, instruas al Klerig-sciencaj studentoj Lernotaksikon, Komputikon kaj Logikon. Li estas ankaŭ membro de la *Internacia Doktoriga Kursaro "Kulturo, edukado, komunikado"* (universitatoj de Romo/Parizo/Potsdamo/Madrido/Lisbono). En la esperantologia kampo, kunlaboris en la terminara komisiono de IAdEM (*Internacia Asocio de Esperantistaj Matematikistoj*), verkis lernolibrojn kaj artikolojn precipe pri vortaraj kaj terminaj problemoj. Redaktis lingvopolitikan rubrikon (*Barbarismi*) en instruika fakrevuo *Cadmo*, respondecis pri la lerneja instru-eksperimento ESP2 (1995) koncerne influon de E-lernado al la metalingva (lingvo-konscia) kapablaro, kaj projektis LIL (*Lingva Interreta Laborejo*), por la trejnado de lingvoinstruistoj. Kadre de ILEI kaj UEA, lanĉis en 1998 la internacian inter-lernejan edukprojekton *Interkulturo* kun la *Interreta Kvazaŭlernejo "Tibor Sekelj"*. Li estis prezidanto de ILEI ekde 1998 ĝis 2003. Membro de AIS (*Akademio Internacia de la Sciencoj, Sanmarino*), por kiu li lekciis en Seminario "*Enkonduko al komputiko*" (Tampereo, 1995). Preleginto en TEJO-KER-seminarioj, IKU, Esperantologia konferenco kaj en multaj fakaj konferencoj kaj seminarioj. Nuntempaj sciencaj interesoj: aŭtomata teksto-analizado, terminologio kaj komputa terminelfosado, tekstaraj korpusoj kaj oftecaj bazaj vortaroj, interkultura kaj interlingva edukado, lingva ekologio, pedagogisciencaj valoroj de E-o.

La 40-a Konferenco de ILEI, 11 – 19 aŭgusto 2007, Ranzan, Japanio

La konferenco okazos en la *Ŝtata Eduk-Centro por Virinoj, 728 Sugaja, Ranzan-mati*. Ĝi situas proksime al la stacidomo *Musaŝiranzan*. La Centro estas bone ekipita per multaj konstruaĵoj, en vasta tereno, kaj certe ĝi estas unu el la plej bonaj staĝejoj en Japanio. La kotizoj varias depende de la loĝlando de la aliĝanto:

A: Ĉiuj landoj escepte de tiuj ĉi-sekve sub B.

B: Iamaj socialismaj landoj de orienta Eŭropo; ĉiuj landoj de Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Respubliko), Afriko kaj Latinameriko.

Kotizoj en EUR	*ĝis 31.03.07*	*ĝis 30.06.07*	*ekde 01.07.07*
Aliĝkategorio	A/B	A/B	A/B
1. Membro de ILEI	50/30	60/36	70/42
2. Ne ILEI-ano	55/35	68/44	80/52
3. Junulo, handikapulo	25/15	30/18	35/21

Aliĝkotizo por 1 tago — *25 EUR* por A- kaj B-landoj.

La kotizo **ne** inkluzivas loĝadon, ekskursojn, aparte pagendajn aferojn, kaj ajnan asekuron! Konferencaneco ne estas transdonebla. Ĉiuj partoprenantoj de la konferenco uzos la Centron ankaŭ por tranoktado.

Se Vi havas demandojn, bonvolu skribi al ILEI: info@ilei.info aŭ aidute@mail.lt. Pliajn detalojn – aliĝilon, mendilon, mapojn, informojn pri kostoj, veturado, manĝado, loĝado, konferencejo, ekskursoj, programo, konferenca urbo, pagmanieroj, kontaktadresoj – vi trovas en IPR 06/3 p. 35-38. kaj IPR 06/4 p. 34-38. aŭ en la hejmpaĝo: http://www.ilei.info/novajxoj/Ranzan_flugfolio.pdf kaj http://ilei.info/konferenco/.

Eblas aliĝi ankaŭ rete: http://www.ilei.info/konferenco/alighilo2007.php[6].

Kiun ajn vojon vi elektas por pagi, bonvolu informi la kasiston tuj kiam vi faras vian pagon: *Sjoerd Bosga, Trådragargatan 27 D, SE-72337 Västerås, Svedio*, <*sjoerd@esperanto.se*>.

Pli preciza programo estos dissendita al aliĝintoj en Dua Informilo fine de marto 2007. Detalojn pri la konferenca programo vi trovos ankaŭ en IPR 07/2, kiu atingos vin komence de majo 2007.

[6] *Aliĝilon vi povas peti ankaŭ de nia redakcio, ĉu papere, ĉu rete! – NdlR*

Ĉeĥio

En Pedagogia fakultato de la Universitato Masaryk en Brno en decembro 2006 finis 59 gestudentoj per studkontrolo studobjekton E-o 1 (kurson por komencantoj). Ili lernis laŭ la kurso *Mazi en Gondolando* 3 horojn semajne. Multaj el ili registriĝis por la daŭriga kurso (E-o 2) dum la printempa semestro. Sed eble ĉi tiu sukceso estos la lasta, ĉar en la venonta lernojaro E-o estos forstrekita el la studprogramo, ĉar ne estas katedro, kiu povus transpreni garantion super la studobjektoj. Ĝis nun la garantion havis provizore la katedro de sociala pedagogio, sed nun ĝia ĉefo tion ne plu volas. Li eĉ decidis nuligi la studobjekton E-o 3, dumferia konversacia kurso en Somera Esperanta Tendaro ĉe Lanĉov en la suda Moravio. Se iuj tamen partoprenos ĝin, ili ne ricevos kreditojn. Al iu ajn lingva katedro ne eblas aldoni E-on, plej taŭga ĝi povus esti sub tutuniversitata Centro de Lingva Instruado, sed tie oni instruas nur "grandajn lingvojn". En la filozofia fakultato estas instruataj ankaŭ minoritataj lingvoj, sed E-on ili ne volas aldoni. *Josef Vojaĉek*, <vojacekjosef@upcmail.cz>

Germanio

Metodiko en la praktiko

Konforme al la agadplano de UEA/ILEI en 2007: instrukapabligo ***Internacia Metodika Semajno*** *en Herzberg am Harz 29.06-06.07.2007 (aŭ nur 29.06-01.07)*

Gvidantoj: ***Katalin Kováts*** kaj ***Sylvain Lelarge***. *Laborlingvo*: nur E-o.
Celpubliko: motivitaj kaj aktivaj instruistoj, instruantoj/ontoj de E-o.
Priskribo: La stabo de la porinstruista retejo *www.edukado.net* ĉi-foje en Herzberg prezentos sian metodologian programon kun la celo pliprofundigi la pedagogiajn kaj lingvoinstruajn lertojn kaj konojn de la interesatoj. La seminarianoj havos eblon ekkoni la retejon kaj ekscios artifikojn por pli efike kaj fruktodone uzi la riĉan kolekton de informoj, ekzercoj kaj materialoj. Krom tio la partoprenantoj havos teorian kaj praktikan trejnadon pri kernaj demandoj de moderna lingvoinstruado; okupiĝos pri lingvo-politikaj demandoj kaj taksado laŭ la eŭropaj normoj. Jam antaŭ la seminario estos dissenditaj kelkaj farendaj taskoj kaj ankaŭ dume oni devos aktive partopreni kaj produkti; labori en grupetoj kaj individue; pruvi sian

instruistan lerton per observado kaj prezento de lecioneroj. La temlisto de la seminario riceveblos post la aliĝo, sed la gvidantoj enketos ankaŭ la bezonojn kaj formas sian programon laŭ la intereso de la ĉeestontoj. La trejnadon ni konsilas al praktikantaj instruantoj de E-o kaj klubgvidantoj. Por la partopreno necesas minimume meznivela lingvokono kaj preteco je aktiva kunlaboro.
Labormaniero: La temojn ni prilaboros en diversaj manieroj kaj aktivaĵoj, tre ofte en (etaj) grupoj, do tute ne temos pri prelegoj.
Partopreno: La seminario daŭros unu semajnon, sed eblas aliĝi nur al la longa semajnfino (29 vendredo-01.07 dimanĉo) aŭ al tiu kaj la sekvaj pliprofundigaj tagoj. Pri la kotizoj, rabatoj, loĝado, manĝado, aldonaj kulturaj programoj kaj aliĝebloj/kondiĉoj kontaktu: *Interkultura Centro Herzberg, DE-37412 Herzberg am Harz, Grubenhagenstr. 6, <esperanto-zentrum@web.de> Tel/faksilo: (+49) 5521-5983, aŭ vizitu: http://www.herzberg.de, http://ic-herzberg.de* *Zsófia Kóródy*

Hungario

Oni organizas en la hungara vilaĝo Egerfarmos desegno-konkurson okaze de Pasko por bazlernejanoj! La infanoj povas desegni pri siaj Paskaj eventoj laŭplaĉe, diversmaniere. La limdato: 01.04.2007. La adreso: *Blanár Gabriella* (ŝi estas la vilaĝestrino, kiu mem nun lernas E-on!), *Egerfarmos HU-3379, Dózsa Gy. u. 1*. Sur la dorsa flanko de la desegnaĵoj oni skribu siajn nomon, aĝon kaj adreson. Kategorioj: I.: 6-10 jaraj; II.:11-15 jaraj. La desegnaĵoj estos prezentataj en la vilaĝa E-domo dum la semajno de Pasko, kaj la vilaĝanoj de Egerfarmos mem estos la ĵurianoj.

Informas: Julianna Vas-Szegedi, <vasszegedi@freemail.hu>

Kroatio

Kroata Televido ekfilmis la 20-an de decembro 6-eran TV-serion dum kiu lernanto instruas E-on al siaj samaĝanoj. La ideo de la redaktoro estis proponi facilan, instruan kaj amuzan programon dum la januaraj vintraj ferioj. La E-kurseto videblis ekde la 5-a de januaro 2007 en TV-programo *Bonan matenon, Kroatio*. La kurseto okazis ĉiutage je kvarono post la 8-a. La meza daŭro de la kurso estis tri minutoj. Jam post la unua elsendo reage telefonis 18 personoj por ricevi informojn. La kurso por dek zagrebaj TV-komencantoj komenciĝis en januaro en la lernejo „Bude Borjan“, ĝin gvidas Spomenka Ŝtimec. Al interesiĝemuloj en Dubrovnik kaj Vela Luka, kie mankas kluboj, oni sendis lernolibrojn. *Spomenka Ŝtimec*

Litovio

La 12-an de decembro 2006 en la Vilna Instruista Domo finiĝis la E-kurso, kiun gvidis *Gediminas Degesys*. Ĝi estis senpaga kurso por komencantoj kaj ĝin finis 15 gestudentoj kaj gelernantoj. La plimulto de la studentoj lernas en Vilna Teknika Universitato de *Gediminas*. Perfektiga kurso estos organizata ankaŭ ĉi-jare. Ankaŭ en Vilna Pedagogia Universitato oni povos studi E-on kiel libere elekteblan studobjekton kaj ricevi 2 studpoentojn.

Ni elkore dankas al la direktoro de Vilna Instruista Domo, s-ino *Zita Zepnickiene* por la eblo uzi la modernan kaj tre hejmecan auditorion.

Gediminas Degesys, <gedisd@yahoo.com>

Nederlando

En la Universitato de Amsterdam funkcias katedro pri Interlingvistiko kaj E-o (docento: Wim Jansen) ekde la jaro 1998. Ĝis nun ĉiujare okazis lekcioj pri Interlingvistiko kun daŭre kreskanta nombro de studentoj. Ekde la dua semestro de la nuna universitata jaro la laboro de la katedro estos pliampleksigita per okazigo de E-kurso. La agado de la katedro estas unu el la branĉoj de la laboro farata de Internacia E-Instituto fondita de *Andreo Cseh* kaj gesinjoroj *Isbrücker*. *Informis: Atilio Orellana Rojas*

Pollando

La 3-an de januaro 2007 en Krakovo, oni faris du filmojn en E-o: La filmon pri la E-leciono-koncerto de *Kim Henriksen* en la ILEI-lernejo en Czajowice apud Krakovo realigis ILEI kaj la lernejo. La koncerton de tiu muzikisto en prestiĝa kulturcentro ĉe la krakova ĉefplaco, kunorganizitan de la E-Teatro "Areno" kaj la Internacia Centro de la Kulturoj, ambaŭ en Krakovo, filmis esperantisto. Post la tempo necesa por prilabori la materialon, ni informos vin pri la apero de la filmoj en nia retpaĝaro. Tie oni trovos ankaŭ pli da informoj. Ni aldonu nur, ke la koncertoj estis bonegaj kaj ilia etoso eksterordinara! *Maria Majerczak*

Usono

NASK (Nord-Amerika Somera Kursaro, 09-27 julio 2007) revenos al la okcidenta flanko de Usono; ĉi-foje sud-Kalifornio. La instruistoj pretigas dunivelan studprogramon kiu emfazos la aktivan uzadon de Esperanto. La vivo kaj verkoj de William Auld estos la ĉefa temo de la supera kurso, kaj estos parto de la studprogramo en la meznivela kurso. *Loko*: Universitato de Kalifornio en San Diego (UCSD)**.** *Instruistoj*: d-ro Paul Gubbins (Britio) kaj Lee Miller (Usono)**.** Stipendioj haveblas. Por pliaj informoj vizitu

http://esperanto.org/nask aŭ skribu al la kunordiganto: *Ellen M. Eddy, 11736 Scott Creek Drive SW, Olympia WA 98512; tel. (360) 754-4563; retpoŝto: <eddyellen@aol.com>*

Vjetnamio

En januaro 2007 la unuan fojon malfermiĝis E-kurso por 400 komencantoj en la Hanoja Ŝtata Fremdlingva Universitato. Fine de junio 2007 en tiu universitato okazos Internacia Junulara Kongreso de E-o (IJK). Al la trimonata kurso registriĝis 400 studentoj. Oni instruos laŭ la Zagrebmetodo. La instruistoj estas: *Nguyen Thi Ngoc Lan, Luong Ngoc Bao, Lai Thi Hai Ly, Nguyen Van Ha, Thieu Quang Dieu* kaj *Nguyen Xuan Thu*. Poste oni organizos ekzamenon, kaj la 10 plej sukcesaj studentoj povos senpage partopreni la 53-an IJK-on. Salutleteroj el la tuta mondo estas bonvenaj al la ret-adreso: *<autuno32@yahoo. com>*.

Nguyen Thu, ĝenerala sekretario de Vjetnama E-Asocio

Lernejaj E-koncertoj – projekto de ICK

Lernejaj E-koncertoj estas projekto de *Internacia Centro de la Kulturoj* (ICK) por informado pri E-o kaj perado de interkulturaj elementoj. ICK en Krakovo-Ĉajovice funkcias ekde majo 2005. Administre ĝi estas ligita kun la neregistara organizo *La Medio kaj Ni*, kiu gvidas la ILEI-lernejon. La eblo krei ICK ekestis danke al la oficiala engaĝiĝo de ILEI en la vivon de la lernejo en Ĉajovice. La devizo de ICK estas: „*La kulturo per kaj por Esperanto*". La institucio intime kunlaboras kun ILEI. En la momento de sia fondiĝo ĝi transprenis parton de la informa kaj eduka agadoj, kiujn ĝi realigas pere de kulturaj rimedoj.

La speciala programo de „komentataj koncertoj" estas prezentata en polaj lernejoj, kaj ankaŭ en kulturcentroj, dum publikaj aranĝoj k.s. Ĝi estas realigata de E-muzikisto(j)/kantisto(j), kun partopreno de la loka prezentantino (iniciatintino de la projekto), *Maria Majerczak*.

Jen la ĉefaj principoj de la *Lernejaj E- koncertoj*:

1) La muzikisto(j) kantas kaj parolas al/kun la publiko en E-o.

2) La prezentanto-nacilingvano

– per interpretado el E-o helpas la muzikisto(j)n komuniki kun la publiko,

– prezentas laŭokaze proprajn komentojn kaj tre subtilan, sed efikan informon pri E-o,

– organizas aktivaĵojn de la publiko (depende de la programo prilaborita por la koncernata lernejo).
3) La publiko lernas simplan kanton aŭ nur refrenon en E-o. La teksto de la kanto estas disponigita al la publiko.

Tiajn koncert-prelegajn programojn jam prezentis
– en januaro 2006 *Kim J. Henriksen* el Danio, *Abdurahman Junusov* kaj *Eljmira Urbanova* el Dagestano,
– en marto 2006 Amir Hadziahmetović el Bosnio/Danio.
La spertoj estas bonegaj. Ĉiuj bone amuziĝas kaj E-o disvastiĝas!

Koncertoj de Amir el „Esperanto Desperado" en polaj lernejoj



Ni vidu iomete la funkciadon de la projekto de *Lernejaj E-Koncertoj* kaj la etoson de tiuj aranĝoj laŭ la ekzemplo de la turneo de *Amir Hadziahmetović* el "*Esperanto Desperado*" en Krakovo kaj Andrychów (Andriĥovo), kiu okazis dum la tagoj 4-7 marto 2006. Tio estis la tria E-muzikturneo, kiun en 2006 organizis Internacia Centro de la Kulturoj en Krakovo – Ĉajovice. *Amir* prezentis plejparte siajn E-lingvajn kantojn preparitajn por nova disko. La unua koncerto okazis ne en lernejo, sed en ĵazklubo: la klubo „*Pod Basztą*" („*Sub la Kastelturo*"), en Andriĥovo, sed ĝi estis akompanata de prelego de la muzikisto pri Bosnio. Valoras aldoni, ke en tiu urbo ekzistas, ekde januaro 2006, fanklubo de du E-bandoj: "*Esperanto Desperado*" kaj "*Hotel Desperado*". La aliaj tri koncertoj okazis en lernejoj de Krakovo:
– en la Elementa Lernejo n-ro 68, konata al esperantistoj kiel ejo, en kiu ĉiujare okazas vojevodia fremdlingva artkonkurso „*Proksimiĝu al la Mondo*", partoprenata ankaŭ de E- klasoj;
– en la Speciala Lern- kaj Edukcentro por Nevidantaj kaj Malbone Vidantaj Infanoj, ĉe la strato Tyniecka 7, kie lernantoj, gvidataj de la instruistino, *Elżbieta Pluta*, muzikumas en E-o kaj regule partoprenas la konkurson „Proksimiĝu al la Mondo";
– en infanvartejo, en la kvartalo Nowa Huta.

Komuna E-muzikumado



Unu el la agrablaj aspektoj de la E-koncertoj en la krakova regiono estas kuna ludado de esperantistaj kaj neesperantistaj muzikistoj. Ĝi helpas disvastigi E-on en muzikaj medioj. Dum la koncerto en la speciala lernejo, kun *Amir* improvize muzikis *Grzegorz Dowgiałło*, talenta nevidanta ĵaz-pianisto, konstante prizorgata de la instruistino, *Bożena Kotkowska-Juda.*

Poste, la E-ensemblo de la muzikemaj nevidantaj kaj malbone vidantaj infanoj koncertis por la gasto, kune kun li.

Esperanto estas la lingvo por ĉiuj!

La koncerto en la lernejo n-ro 68 estis speciale interesa. Imagu spektaklejon kun 150 gelernantoj kantantaj unuvoĉe: *Esper', Esperanto, Desper', Desperado* kaj '*Esperanto estas la lingvo por ni*! en lernejo, en kiu la Internacia Lingvo ne estas kaj neniam estis instruata! La akcepto estis varma kaj spontanea. Post la koncerto la E-Desperadano disdonadis dum 40 minutoj sian aŭtografon al longa vico da lernantoj, estis invitita al leciono kaj intervjuata de lernantinoj – fervoraj ĵurnalistinoj de la lerneja gazeto. Tio pruvas, ke la koncerto ege impresis la junajn homojn. Espereble ili longe gardos la rememoron pri la E-evento.

En la infanvartejo afiŝo informis la gepatrojn, ke dum la koncerto iliaj etuloj lernos kanton en E-o.

En Esperantio oni trovas sufiĉe multajn homojn talentajn kaj posedantajn spertojn en diversaj terenoj. Ni ne fermu ilin en E-kluboj! Dum la koncertoj kaj kontaktoj kun la publiko de bonaj kaj – laŭ la opinioj, kiujn ni aŭdis pri ĉiuj prezentiĝintaj artistoj kaj preleganto – ege simpatiaj E-muzikistoj rapide aperas intereso por la lingvo. En kelkaj lernejoj la E-muzikaranĝoj subtenas la jam ekzistantan E-aktivadon, en aliaj – ili celas enkondukon de E-instruado aŭ, se momente mankas instruisto, minimume informadon pri E-o.

Maria Majerczak, direktoro de ICK

AKEL2 en Gloucester

Mallongigita raporto pri la tria renkontiĝo en Gloucester (15-20 oktobro 2006) kadre de projekto "Akel2" eŭropa Socrates Comenius: Alternativa komunikado inter eŭropaj lernejoj per internacia neŭtrala lingvo E-o

„Ni troviĝis en la stacidomo de Modeno je la 10.00, […]. Post la adiaŭo al niaj gepatroj ni envagoniĝis direkte al Parma kun la instruistoj Ermanno Tarracchini kaj Valeria Bocchini. En Parma atendis nin Luisa Oberrauch kaj Vittorio Madella – niaj instruistoj de la Internacia Lingvo – kun kiuj, kurante, ni apenaŭ sukcesis trafi la aŭtobuson kiu veturigis nin al la flughaveno G.Verdi de Parma. Ni estus devintaj forflugi je la 15.15, sed la aviadilo malfruis je preskaŭ unu horo. Finfine ni estas en la aviadilo, ni superflugas Parman, la Padan ebenaĵon, la riveron Pado, la Antaŭalpojn, la Alpojn, ili estas belegaj!...Francion, kaj fine, pli-malpli 2 horojn post nia starto de Parma, la Manikon. Tamen, ... super la Maniko la ĉielo estas nuba tiel ni ne vidas la maron. Ni ekrimarkas, ke ni estas alvenantaj kiam ni komencas ekvidi la vojojn kun la aŭtomobiloj kiuj, nekredeble, veturas tenante la maldekstron! La flugo estis vere tre bela. Alvenintajn al Londono Stansted nin akceptas la hispana delegacio, la lernejo de la I.E.S. Reyes Catolicos el Ejea de los Caballeros (Aragon) per afiŝo kun Esperanta skribaĵo de la lernejo „ Sir Thomas Rich's School".



Grupo de "Akel2" ĉe la lernejo "Sir Thomas Rich's School" de Gloucester (ne ĉeestas la itala instruistino Valeria kaj la hispana lernantino Lucia, ĉar ili estis la fotintinoj, kaj mankas Marta de Hispanio)

Tiel komenciĝas la "taglibro" de la kvar italaj studentoj de la Ŝtata Mezlernejo "Cavour" de Modeno, je la starto de la tria internacia renkontiĝo programita de la AKEL-projekto.
Dum aŭtuna tipa brita semajno, la bulgara kaj itala delegacioj, al kiuj apudmetiĝis unuafoje ankaŭ tiu hispana, de la 15a ĝis la 21a de oktobro kunvenis en Glostro (angle: Gloucester), gastoj de "Sir Thomas Rich's School".
La interŝanĝo de spertoj kaj informoj koncerne la organizadon de la respektivaj lernejsistemoj kaj la priskribon de la pedagogiaj projektoj, kiuj uzadas la plej ĝisdatigitajn multmediajn teknologiaĵojn, - insterŝanĝo kiu vidis la kvar grupojn komuniki kaj perfekte kompreni unu la alian pere de la pontolingvo Esperanto – , estis karakterizita de la vizito al la “Sir Thomas Rich’s School” kaj de la oficialaj renkontiĝoj kun ties estro kaj kun la urbestro de Glostro, en kies teritorio troviĝas la lernejo.
La programo de la semajno, organizita de la tre kapabla instruistino de la "Sir Thomas Rich’s School” *Jacky Hewett*, estis ĝuiigita de kelkaj kulturaj vizitoj al la historiaj centroj de la urbetoj Cheltenham kaj Glostro kaj de la splendaj urboj Oksfordo (angle: Oxford) kaj Londono (angle: London).



“Grupo Akel2” ĉe la Universitato de Oksfordo

„18an de oktobro 2006. Post la tagmanĝo ni iris al la renkontiĝo kun la urbestro (urbestrino) en la urbodomo kie ni aŭskultis la salutojn kaj la parolojn en la angla lingvo de la urbestro tradukitaj en E-on de s-ino Elizabeth. La sinjorino urbestro kaj ŝia "malbona ŝerifo", antaŭ ol paroli al ni pri la regado de la urbo, pri ties leĝoj kaj tradicioj, surmetis la tradiciajn ceremoniajn kostumojn kun la ruĝaj manteloj kaj la larĝaj ĉapeloj; tiel ni profitis de la okazo elkliki kelkajn fotojn kune kun ili. „



La tuta grupo "Akel2" okaze de la akcepto de la urbestro de Glostro

Tiuj ĉi interesaj renkontiĝoj kaj agrablaj vizitoj, gviditaj de malnovaj kaj novaj esperantistaj amikoj de la Projekto AKEL, plifirmigis la rilatojn inter la junaj italaj, bulgaraj, britaj kaj hispanaj partoprenantoj kaj restos por ĉiam en ilia memoro por atesti la eblon plilarĝigi la komunikajn horizontojn kaj spertojn pri popoloj eĉ fizike "malproksimaj" kaj kulture "malsamaj", pere de pli bona ekkono de la kuntekstoj de la vivo kaj de la lokaj gepatraj lingvoj.

Eĉ la momentoj malpli formalaj kaj de ŝajna "amuzo" estis karakterizitaj de malkovro kaj de "sperto" de la tradicioj kaj de kulturaj specifecoj de la gastigantoj: la manĝoj, la ejoj de la renkontiĝoj kaj de la kolektiva ludado, la popolaj dancoj.

Pri la vizito al la ĉefurbo, la junaj italoj skribis en siaj taglibroj:
“19an de oktobro 2006. Antaŭ la 12a ni estis en Londono, proksime de Royal Albert Hall […]; tie atendis nin la esperantista gvidistino de Londono Helen Fantom kaj Tom, universitata studento esperantista, kiu venis al Modeno en nian lernejon en aprilo. Unue ni vizitis la belegan Hyde parkon, haltante je la komenco antaŭ la Royal Albert Hall. Trairante la parkon ni vidis sciurojn en libereco, kiuj alproksimiĝis al ni sen timo, belegan lagon kun multaj cignoj kaj birdoj de malsamaj specoj kaj rivereton dediĉitan al princino Diana. Observinte la monumenton de la generalo Wellington, tiu kiu venkis Napoleonon en Waterloo, ni alvenis al Palaco Buckingham kaj al la rezidejo de la reĝino Elisabeth, kie la gardistoj iradis tien kaj reeen […]
Poste ni vidis la blankan domon de la Parlamento (House of Parlament) kun Big Ben kaj la katedralon Westminster en kiu nur la parlamentanoj rajtas edziĝi. Je la 14a, lacaj kaj malsategaj, ni eniris supermerkaton por aĉeti sandviĉojn kaj trinkaĵojn kiujn ni konsumis sub arkado. Post la manĝeto ni daŭrigis nian viziton kaj direktiĝis al National Gallery en Trafalgar Square, kie ni klikis fotojn sur la monumento kun la leonoj kune kun Ivan. Poste ni promenis al la katedralo St Paul kaj fine ni transiris la ponton Waterloo.
Irinte dum multaj horoj kaj laŭ multaj kilometroj (10-12) tra Londono, lacaj kaj “detruitaj”, tamen entuziasamj pro la multaj interesaj kaj famkonataj aferoj kiujn ni vidis, ni faris niajn nemalhaveblajn aĉetojn de memoraĵoj pri Londono. Fine ni alvenis al Royal Theatre, kie atendis nin la aŭtobuso por la hejmvojaĝo”.



Kelkaj junuloj de “Akel2” en Londono: italoj, bulgaroj kaj hispanoj

La junaj italoj ankaŭ skribis en siaj taglibroj: *“La vetero ne estis la plej bona: de tempo al tempo pluvis kaj poste revenis la suno kaj tio daŭre! Oni diris al ni ke ĉi tie, en Britio, ĝi ĉiam estas tia!*
20an de oktobro 2006. Vekiĝo je la 8.00. Ni duŝis nin kaj babiladis atendante la aŭtobuseton kiu devis veturigi nin al la lernejo por malavara angla matenmanĝo ĉefe el duongrasa lardo kun fazeoloj, kolbaseto kaj pureo el terpomoj, kuketoj kaj pluraj trinkaĵoj. [...] Je la 18a denove ni revenis al la lernejo kie ni vespermanĝis kaj dancis en la granda salono ĉi kaze ekipita per tabloj kaj subglasaj diskoj aparte realigitaj okaze de la festo. ... ni dancis dum la tuta vespero amuzante nin kiel neniam antaŭe.”



La granda dancvespero en la festsalono de la “Sir Thomas Rich’s School”

Dum la laborrenkontiĝoj la respondeculoj de la projekto “AKEL 2” pridiskutis tion, kion oni faris ĝis nun kaj planis la agadojn por la estonteco. Ĝis la sekvonta renkontiĝo, kiu okazos en Bulgario en la urbo Polski Trambesh dum Aprilo 2007, en ĉiu lernejo oni invitos al konkurso por eseo laŭ la temo “*Mia eŭropa civitaneco*”, estos organizataj fotoekspozicioj sub la titolo “*Mi loĝas en Eŭropo*” kaj kolektiĝos materialoj kaj konkretaj objektoj pri “Kutimoj kaj tradicioj aŭ kiamaniere festas mia popolo”.
Modeno, novembro 2006. Ĝis revido al ĉiuj!

La geinstruistoj : Ermanno Tarracchini, Valeria Bocchini,
Luisa Oberrauch, Vittorio Madella
La gestudentoj: Fabio, Alessandro, Michael, Marco

LABORKOMISIONOJ
Ekzamena: Probal Dasgupta (prez.), Boris Grigorjevič Kolker (vicprez.), Reza Torabi (sekr.), Mireille Grosjean, Julián Hernández, Jorge Antonio Leoni de León, Oliver Mazodze
Elekta: Tieko Isikawa, Ana Montesinos de Gomis, Aurora Bute
Kontrola: Ulla Luin, Bengt Jonsson, Marianne Westman
Lerneja: Carola Antskog, Luigia Madella, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi
Regulara: Marija Beloŝevič, Rob Moerbeek, Atilio Orellana Rojas
Terminara: Maŭro La Torre, Miroslav Malovec

KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ
EEU: Eŭropa Esperanto-Unio. Komisiito pri instruado kaj rilatoj kun ILEI: Carola Antskog, Brokärrvägen 89, FI-25700 Kimito, Finnlando, cantskog@kolumbus.fi
E@I (Esperanto ĉe Interreto, www.ikso.net): faka sekcio de TEJO (www.tejo.org, poŝtadreso ĉe UEA).
FIPLV (Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj): Reprezentanto de ILEI: Jennifer Bishop, esperanto@Education.monash.edu.au
IEI: Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando.
TEJO: Observanto de TEJO ĉe ILEI: François Hounsounou (adr. sur p. 40., Benino).
UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. www.uea.org. Observanto de ILEI ĉe UEA: Radojica Petrović. A-komitatano el ILEI: Atilio Orellana Rojas. Observanto de UEA ĉe ILEI: Claude Nourmont. Reprezentanto de ILEI en la Afrika Komisiono de UEA: François Hounsounou
UNESKO (en operaciaj rilatoj). Reprezentantoj de ILEI: François Lo Jacomo, 72, quai de la Loire, FR-75019 Paris, francois.lojacomo@wanadoo.fr; Monique Arnaud, Ecole Chemin de l' Espéranto, Les Pelloux, FR-05500 Benevent et Charbillac, monique.arnaud@tiscali.fr; Jean-Pierre Boulet, 17 Av. de la Dordogne, FR-63800 Cournon d'Auvergne, tel.: (+33) 4 73 84 90 60; Mireille Grosjean, Temple 20 pf. 9, CH-2416 Les Brenets, tel/fakso: (+41 32) 932 18 88, mireille.grosjean@rpn.ch

MEMBRIĜO AL ILEI KAJ PAGADO POR ALIAJ SERVOJ
Membreco kostas 18 EUR en A-landoj (laŭ UEA-difino) kaj 9 EUR en B-landoj, kun ricevo de 4 numeroj de IPR jare. Kun aliro nur al reta versio, membreco kostas 4 EUR (A) kaj 2 EUR (B). Bonvenaj estas donacoj al la fondaĵoj de ILEI, konferencaj pagoj kaj abonoj por Juna amiko. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas membrigojn kaj donacojn; simile, perantoj por Juna amiko akceptas abonojn enlande. Por pagoj rekte al la internacia ILEI informu skribe al la kasisto de ILEI: Sjoerd Bosga, Tråddragargatan 27D, SE-723 37 Västerås, Svedio. Tel.: (+46 21) 41 70 45, sjoerd@esperanto.se.
La pagoj povas okazi pere de konto de ILEI ĉe UEA, aŭ al la sveda konto.
* Pagoj al konto de ILEI ĉe UEA: Pri pagmanieroj vidu informojn en la Jarlibro de UEA. Atentu pri aldono de sumo por bankkostoj. Indiku vian nomon kaj landon, mallonge la celon de la pago, kaj unu el la tri kontoj ilek-a (ĝenerala), juna-l (Juna amiko), pike-b (projekto Interkulturo).
* Pagoj al la sveda bankkonto: El Svedio pagu al konto 8327-9, 994 515 014-3 ĉe Föreningssparbanken. El aliaj landoj pagu al IBAN SE56 8000 0832 7999 4515 0143 kun BIC/SWIFT kodo SWEDSESS. Aldonu 6 eŭrojn por svedaj bankkostoj se vi pagas el ekster Eŭropa Unio.
* Simpla abono de IPR sen membreco: 18 EUR. Reklamtarifoj por IPR: 180 EUR por plena, 110 EUR por duona kaj 70 por kvarona paĝoj. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon: kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.
ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag sub numero 27.181.064.
Hejmpaĝo de ILEI: http://www.ilei.info

REDAKCIAJ INFORMOJ
Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): Iwona KOCIĘBA, Graaf de Fiennesln 54, BE-2650 Edegem. Presado: Flandra Esperanto Ligo, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, tel: (+32-3)-234 34 00.
Redaktejo: NÉMETH József, HU-8531 IHÁSZ, Fő u. 41/5. Rete: <jozefonemeth@yahoo.com>, http://www.ilei.info/ipr/; tel: (+36-89) 356-050. La revuo aperas ankaŭ kasede registrita por leghandikapuloj.
Informas: Rob MOERBEEK, Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk, <r.moerbeek@wanadoo.nl>.
La numeron ni sendis al la presejo la 26-an de januaro 2007, redaktofino por la sekva numero: 15.04.2007.

SEKCIOJ
Albanio: Vasil Pistoli, c/o Bardhyl Selimi, Rr. Maliq Muco, Pall. 50, ap. 3, AL-Tirana,
selimibardhyl@yahoo.com
Aŭstralio: Penny Vos, 14 Candelo St, AU-2550 Candelo NSW,
penivos@yahoo.com
Belgio: Iwona Kocięba, Graaf de Fiennesln 54, BE-2650 Edegem,
iwona.kocieba@telenet.be
Benino: François Hounsounou,
BP 226 BJ-Lokossa-Mono, Rep du Benin, West Afrika,
hounfranc@yahoo.fr
Brazilo: Antonio Felix da Silva
Rua Engenheiro Francisco Azevedo, 243, Sumarezinho - São Paulo – SP,
BR-05030-010, geinstruistoj@ileibr.org
Britio: Tellier Angela, 10 Marina Gardens, GB IP11 2HW Felixstowe, Suffolk,
angela@esperantoeducation.co.uk
Ĉeĥio: Jana Melichárková,
CZ-696 02 Ratíškovice 938,
melicharkova@quick.cz
Ĉinio: Zhang Danchen, General For¬eign Languages Dept., 29-34 North Part, Huazhong Normal University, CN-430070 Wuhan,
zdchen@public.wh.hb.cn
Danio: Arne Casper-Mortensen, Bryggervangen 70, 4. tv. DK-2100 Kobenhavn, arnecasper@dbmail.dk
Finnlando: Carola Antskog,
Dragsfjärdvägen 690, FI-25700 Kimito, cantskog@kolumbus.fi
Francio: Michel Dechy, 65 allée de la crémaillère,
FR-59650 Ville¬neuve d'Ascq, michel_dechy@hotmail.com
Germanio: Zsófia Kóródy,
Esperanto-Centro, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg/Harz,
zsofia.korody@esperanto.de
Hungario: József Németh,
Fő u. 41/5, HU-8531 Ihász, jozefo.nemeth@gmail.com
Irano: Hamzeh Ŝafii, P.O. Kesto 17765-184, IR-Teheran,
ilei.ir@esperanto.org
Italio: Luigia Oberrauch Madella, via Prampolini 8,
IT-43100 Parma, silkovojo@aliceposta.it

Japanio: Isikawa Tieko, 103, Tate 1-6-6, Siki, Saitama JP-353-0006, isksanjo@ff.e-mansion.com
Katalunio: Pedro M. Martin Bututxaga, Arnau Gatell 2-4-2, ES-17300 Blanes, ileicat@hotmail.com
Korea Resp.: CHO Sung Ho, Department of Biology, Inha Universitato, Incheon KR-402-751, shcho@inha.ac.kr
Kroatio/KEL: Marija Jerković, Jarunska 6, HR-10000 Zagreb, mjerkovic@net.hr
Kroatio/KEU: Ivan Bekavac-Basić, Kuŝlanova 59, HR-10000 Zagreb, ilei@hes-keu.hr
Kubo: Marta Alonso Gutiérrez, Malecón 659 entre Belascoaín y Gervasio; CU-10200 Ciudad de La Habana, kubesp@enet.cu
Nederlando: Atilio Orellana Rojas, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, iei001@tiscali.nl
Norvegio: Anne-Karin Bondhus, Baldersveg 3C, nr 17, NO-7033 Trondheim, anne.k.bondhus@itk.ntnu.no
Pollando: Maria Majerczak, ul. Armii Krajowej 7, m. 122, PL-30 150 Krakow, mmajerczak@gmail.com
Rumanio: Mihai Trifoi, Str. Principala Bl.1 Ap.3, RO-527116 Bixad/Jud. Covasna, trifoi@honoris.ro
Rusio: Irina Gonĉarova, Moloeznaja 38-10, Odincovo 2, Mosk. obl. RU-143000, mirina@online.ru
Svedio: Siv Burell, Lekstorpsv. 46 E, SE-443 41 Graabo, s.burell@telia.com
Svislando: Mirelle Grosjean, Grand-rue 9. Pf. 9, CH-2416 Les Brenets mireille.grosjean@rpn.ch
Togolando: Attiogbe-Agbemadon B., Mensah, T. I. E. To, B.P. 13169, Lome-TOGO, esp.togo@cafe.tg
Ukrainio: Nina Daniljuk, prospekt Sobornosti, 32-108, Luck-26, UA-43026, nina_daniljuk@ukr.net

Usono kaj Kanado: Doroteo Holland, 5140 San Lorenzo Dr, Santa Barbara, CA 93111-2521 (US), dorothyh@west.net
Venezuelo: Andrés Turrisi, Cen.Res.Puerta del Este.Torre, Oeste, piso15, ap.153, Av.Madrid, VE-1070 La California Norte, Caracas, andesp@internet.ve

REPREZENTANTOJ
Armenio: Lida Elbakjan, Moldo-vakan 26/2, kv.52, AM-375062 Erevan, LIDELB@freenet.am
Barato/Hindujo: Venkatesh Reddy, No. 216, Off main Road, Whitefield, Bangalore 66, Karnataka, esperovr@yahoo.co.in
Bosnio kaj Hercegovino: Nimeta Kulenoviĉ, Branica Sarajeva 15/V, BA-71000 Sarajevo
Ĉilio: Héctor Campos Grez, Casilla 903, CL-3340000, hecg@uea.org
Estonio: Helgi Hromova,
Pk. 623, EE-12602 Tallinn
Islando: Loftur Melberg Sigurjónsson, Traðarberg 13,
IS-221 Hafnarfjörður, loftur@skyrr.is
Israelo: Gian Piero Savio, 13/4 Menora-str. IL-53490 Givatajim, saviogp@zahav.net.il
Kongo DR: Ngangu Nduantoni-Bakidila, B.P.13, CD-Lukala, Bas-Zaïre
Kostariko: Hugo Mora Poltronieri, Apartado 4981, CR-1000 San José, tikoguau@gmail.com
Litovio: Algimantas Piliponis, Kavoliuko 3-93, LT-04325 Vilnius, piliponis@centras.lt
Meksiko: José de Jesús Corrales C.,
Belice 116, Fraccionamiento Guadalupe, Durango, Dgo.
jdjcorrales@yahoo.com.mx
Nov-Zelando: Gwenda Sutton, 12C Herbert Gardens, 186 The Terrace, NZ-6001 Wellington 1, gwenda.s@ihug.co.nz
Portugalio: João Jose Santos, Apartado 123, PT-5301-902 Bragança, joaojosesantos@gmail.com
Serbio: Radojica Petrović, Bul. oslobodjenja 36, 32000 Ĉaĉak, radp@ptt.yu
Slovenio: Marija Zlatnar-Moe, Miliĉinskega 66, SI-1000 Ljubljana, Marija.Zlatnar@guest.arnes.si
Uzbekistano: Eugeno S. Perevertajlo, Abon. jashik 140, Poĉtamt, UZ-700000 Taŝkento, CIS, esperuzo@mail.ru

SEKCIOJ

Albanio: Vasil Pistoli, c/o Bardhyl Selimi, Rr. Maliq Muco, Pall. 50, ap. 3, AL-Tirana, *selimibardhyl@yahoo.com*

Aŭstralio: Penny Vos, 14 Candelo St, AU-2550 Candelo NSW, *penivos@yahoo.com*

Belgio: Iwona Kocięba, Graaf de Fiennesln 54, BE-2650 Edegem, *iwona.kocieba@telenet.be*

Benino: François Hounsounou, BP 226 BJ-Lokossa-Mono, Rep du Benin, West Afrika, *hounfranc@yahoo.fr*

Brazilo: Antonio Felix da Silva Rua Engenheiro Francisco Azevedo, 243, Sumarezinho - São Paulo – SP, BR-05030-010, *geinstruistoj@ileibr.org*

Britio: Tellier Angela, 10 Marina Gardens, GB IP11 2HW Felixstowe, Suffolk, *angela@esperantoeducation.co.uk*

Ĉeĥio: Jana Melichárková, CZ-696 02 Ratíškovice 938, *melicharkova@quick.cz*

Ĉinio: Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., 29-34 North Part, Huazhong Normal University, CN-430070Wuhan, *zdchen@public.wh.hb.cn*

Danio: Arne Casper-Mortensen, Bryggervangen 70, 4. tv. DK-2100 Kobenhavn, *arnecasper@dbmail.dk*

Finnlando: Carola Antskog, Dragsfjärdvägen 690, FI-25700 Kimito, *cantskog@kolumbus.fi*

Francio: Michel Dechy, 65 allée de la crémaillère, FR-59650 Villeneuve d'Ascq, *michel_dechy@hotmail.com*

Germanio: Zsófia Kóródy, Esperanto-Centro, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg/Harz, *zsofia.korody@esperanto.de*

Hungario: József Németh, Fő u. 41/5, HU-8531 Ihász, *jozefo.nemeth@gmail.com*

Irano: Hamzeh Šafii, P.O. Kesto 17765-184, IR-Teheran, *ilei.ir@esperanto.org*

Italio: Luigia Oberrauch Madella, via Prampolini 8, IT-43100 Parma, *silkovojo@aliceposta.it*

Japanio: Isikawa Tieko, 103, Tate 1-6-6, Siki, Saitama JP-353-0006, *isksanjo@ff.e-mansion.com*

Katalunio: Pedro M. Martin Bututxaga, Arnau Gatell 2-4-2, ES-17300 Blanes, *ileicat@hotmail.com*

Korea Resp.: CHO Sung Ho, Department of Biology, Inha Universitato, Incheon KR-402-751, *shcho@inha.ac.kr*

Kroatio/KEL: Marija Jerković, Jarunska 6, HR-10000 Zagreb, *mjerkovic@net.hr*

Kroatio/KEU: Ivan Bekavac-Basić, Kušlanova 59, HR-10000 Zagreb, *ilei@hes-keu.hr*

Kubo: Marta Alonso Gutiérrez, Malecón 659 entre Belascoain y Gervasio; CU-10200 Ciudad de La Habana, *kubesp@enet.cu*

Nederlando: Atilio Orellana Rojas, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, *iei001@tiscali.nl*

Norvegio: Anne-Karin Bondhus, Baldersveg 3C, nr 17, NO-7033 Trondheim, *anne.k.bondhus@itk.ntnu.no*

Pollando: Maria Majerczak, ul. Armii Krajowej 7, m. 122, PL-30 150 Krakow, *mmajerczak@gmail.com*

Rumanio: Mihai Trifoi, Str. Principala Bl.1 Ap.3, RO-527116 Bixad/Jud. Covasna, *trifoi@honoris.ro*

Rusio: Irina Gončarova, Moloeznaja 38-10, Odincovo 2, Mosk. obl. RU-143000, *mirina@online.ru*

Svedio: Siv Burell, Lekstorpsv. 46 E, SE-443 41 Graabo, *s.burell@telia.com*

Svislando: Mirelle Grosjean, Grand-rue 9. Pf. 9, CH-2416 Les Brenets *mireille.grosjean@rpn.ch*

Togolando: Attiogbe-Agbemadon B., Mensah, T. I. E. To, B.P. 13169, Lome-TOGO, *esp.togo@cafe.tg*

Ukrainio: Nina Daniljuk, prospekt Sobornosti, 32-108, Luck-26, UA-43026, *nina_daniljuk@ukr.net*

Usono kaj Kanado: Doroteo Holland, 5140 San Lorenzo Dr, Santa Barbara, CA 93111-2521 (US), *dorothyh@west.net*

Venezuelo: Andrés Turrisi, Cen.Res.Puerta del Este.Torre, Oeste, piso15, ap.153, Av.Madrid, VE-1070 La California Norte, Caracas, *andesp@internet.ve*

REPREZENTANTOJ

Armenio: Lida Elbakjan, Moldovakan 26/2, kv.52, AM-375062 Erevan, *LIDELB@freenet.am*

Barato/Hindujo: Venkatesh Reddy, No. 216, Off main Road, Whitefield, Bangalore 66, Karnataka, *esperovr@yahoo.co.in*

Bosnio kaj Hercegovino: Nimeta Kulenović, Branica Sarajeva 15/V, BA-71000 Sarajevo

Ĉilio: Héctor Campos Grez, Casilla 903, CL-3340000, *hecg@uea.org*

Estonio: Helgi Hromova, Pk. 623, EE-12602 Tallinn

Islando: Loftur Melberg Sigurjónsson, Traðarberg 13, IS-221 Hafnarfjörður, *loftur@skyrr.is*

Israelo: Gian Piero Savio, 13/4 Menora-str. IL-53490 Givatajim, *saviogp@zahav.net.il*

Kongo DR: Ngangu Nduantoni-Bakidila, B.P.13, CD-Lukala, Bas-Zaïre

Kostariko: Hugo Mora Poltronieri, Apartado 4981, CR-1000 San José, *tikoguau@gmail.com*

Litovio: Algimantas Piliponis, Kavoliuko 3-93, LT-04325 Vilnius, *piliponis@centras.lt*

Meksiko: José de Jesús Corrales C., Belice 116, Fraccionamiento Guadalupe, Durango, Dgo. *jdjcorrales@yahoo.com.mx*

Nov-Zelando: Gwenda Sutton, 12C Herbert Gardens, 186 The Terrace, NZ-6001 Wellington 1, *gwenda.s@ihug.co.nz*

Portugalio: João Jose Santos, Apartado 123, PT-5301-902 Bragança, *joaojosesantos@gmail.com*

Serbio: Radojica Petrović, Bul. oslobođenja 36, 32000 Čačak, *radp@ptt.yu*

Slovenio: Marija Zlatnar-Moe, Miličinskega 66, SI-1000 Ljubljana, *Marija.Zlatnar@guest.arnes.si*

Uzbekistano: Eugeno S. Perevertajlo, Abon. jashik 140, Počtamt, UZ-700000 Taškento, CIS, *esperuzo@mail.ru*